



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Decembro 2017 n-ro: 24



## *Merhaba,*

Yirmi dördüncü sayımızla birlikte dergimi iki yaşını tamamlıyor. Yola çıkarken buraya kadar ulaşabileceğimize dair bir beklenimiz yoktu. Bugüne kadar dergimize katkıda bulunan herkese teşekkür ederiz.

Bu sayıda da sizler için birbirinden ilginç okunmaya değer yazılar var. Gene de ABD'den Rebecca Dufrense ile Türkiye'den Vasil Kadifeli'nin birlikte Cadılar Bayramı için yaptıkları çeviriyi sunmaktan mutluluk duyuyoruz. Çeviri ünlü yazar Edgar Allan Poe'nun "Kızıl Ölümün Maskeli Balosu" adlı hikayesi. Çeviriyi Hırvat Esperanto Birliğinin Lucija Borčić anısına düzenlediği yarışmaya gönderdiyse de maalesef bir derece alamadı. Buna rağmen oldukça yüksek kalitede bir çalışma olduğunu düşünüyoruz.

*Hepinize iyi okumalar !*


## *Saluton,*

Per nia ĉi tiu dudek kvara numero nia revueto kompletas sian duan jaraĝon. Ekvojaĝante ni tute ne pensis k n iam atinusi ĉi tiun punkton. Ni dankas al ĉiuj, kiuj ĝis nun kontribuis al nia revueto.

Ankaŭ en ĉi tiu numero ekzistas multaj interesaj legindaj tekstoĵ por vi. Sed ni ĝojas prezenti al vi la tradukaĵon farita de Rebecca Dufrense el Usono kaj Vasil Kadifeli el Turkujo por la festo de Haloveno. La tradukaĵo estas la rakonto "La Maskobalo de la Ruĝa Morto" de l fama verkst Edgar Allan Poe. Kvankam ni sendis ĝin al la tradukkonkurso de la Korata Esperanto Ligo farita je memoro de Lucija Borčić ĝi bedaŭrinde ne ricevis iun ajn premion. Tamen ni pensas ke ĝi estas laboro de konsiderinda alta kvalito.

*Bonan legadon al ĉiuj !*

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

**TURKA STELO**

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
La 84-a Itala Kongreso de Esperanto	4
Zamenhof Tago - Libro Tago	6
Konciza biografio de LL Zamenhof	6
Hispaneska Divorco	8
PANDORA (ΠΑΝΔΩΡΑ)	10
Patro kaj filo (2/2)	11
Alloga Turkio	12
Fabelo pri Nigra Bagnulo	14
La Maraj Popoloj	15
La ansero kaj la porketo	17
Nacia Fervojista Esperanto Konferenco	17
“La ventro de Parizo” de Emile Zola	18
Parabolo pri vivo post naskiĝo	19
Poemoj	19
La Maskobalo de la Ruĝa Morto	20
Ŝercoj	23
Kurcvort-enigmo	24
Mallonga Historio de Filozofio (22)	25
El la libro de "Dao de Jing" (16)	26
Dankon Amiko (11)	26
Patro Kristnasko ricevis donacon	27
Premio pri Homaj Rajtoj al Itala Esperanto-Federacio	28
Ekspozicio pri Zamenhof	28
Japandevena ISHIGURO Nobel-premiita	29
Esperanto Kurso (22)	30
Tago de l' Negra Konscienco (poemo)	31
Veganarto	32

## Kursoj



1) Okazas du kursoj en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul.  
(a) La unuan kurson gvidas Nicholas Sarmiento kiu instruas al ok komencantoj, (7 lernantoj kaj 1 instruisto). Jen foto el la kurso de Nicholas:  
(b) La duan kurson gvidas Murat Özdizdar, kiu instruas al sep komencantoj, (4 lernantoj kaj 3 instruisto).

Ambaŭ kursoj daŭros dum la tuta lerneja jaro.

2) Komenciĝis la kurso por Esperanto interesiĝantoj en Kadıköy distrikto en Özgün Berkol Doğan Sciencfikcia Biblioteko (vidu Turka Stelo #21 p.22). La kurso estas pagata kaj daŭros dum tri monatoj. Nintempe estas 11 lernantoj en la kurso. Jen foto el la kurso:



3) La kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato ne okazas ĉijare.

## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo



Karaj,

*Esperanto-Sumoo estas mirinda projekto, kiu ŝanĝas la movadon kaj*

*la mondon. Ni, partoprenantoj, legas librojn, ĉiun tagon, pli ol mem promesitan kvanton da paĝoj, kun ĉirkaŭ 350 homoj en la mondo.*



Hori Jasuo

---

En la 12-a de novembro komenciĝis la 49-a Internacia Esperanto-Sumoo kaj gi daŭris ĝis la 26-a de novembro dum 15 tagoj. Dum la preparado de ĉi tiu numero la rezultoj ankaŭ ne estis anoncigitaj.

Por pli da informoj pri Esperanto-Sumoo vi povas viziti la jenajn ligilojn:

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

En Wikipedio:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_Esperanto-Sumoo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo)

Nia grupo en facebook'o:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

## UEA



N-ro 713 (2017-11-01)

**UEA ŝanĝas sian Ĝeneralan Direktoron, celas finanĉan resanigon**

En kunsido la 31-an de oktobro, la Estraro de UEA decidis pri grava ŝanĝo en la administrado de UEA, kun la konsento kaj subteno de la Ĝenerala Direktoro. D-ino Veronika Poór, kiu laboras en la Centra Oficejo ekde la komenco de 2016, kaj kiel Ĝenerala Direktoro ekde majo 2016, transdonos sian postenon la 1-an de januaro 2018 al s-ro Martin Schäffer... [...]

N-ro 716 (2017-11-10)

**Reprezentanto de UEA alparolis la plenan sesion de la 39-a Ĝenerala Konferenco de Unesko**

La 6-an de novembro 2017, reprezentanto de UEA faris triminutan paroladon antaŭ dumilo da diplomatoj, aktivuloj kaj oficistoj el la tuta mondo, en la plena sesio de la 39-a Ĝenerala Konferenco de Unesko, okazanta ĉe la sidejo de Unesko en Parizo. [...]

N-ro 717 (2017-11-16)

**UEA serĉas novajn estraranojn**  
Ekde la 1-a de januaro de 2018 Martin SCHÄFFER transprenos la funkcion de Ĝenerala Direktoro de UEA kaj forlasos la postenon de Ĝenerala Sekretario. La Estraro de UEA krome esprimis ke... [...]

N-ro 718 (2017-11-16)

**Belartaj Konkursoj de UEA en 2018**

La Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA, unu el la plej gravaj kaj jam klasikaj manifestiĝoj de la E-kulturo, invitas verkemulojn al partopreno en ilia 68-a okazigo. [...]

## TEJO



**Ni dungas projektmastrumiston!**

La Germana

Esperanto-Junularo (GEJ), kune kun TEJO kaj aliaj landaj sekcioj, dungas oficiston por la nova jaro. Ĉu temas pri vi? [...]

**Rakoen Maertens reprezentis TEJO-n kaj UEA-n en la Ĝenerala Konferenco de UNESCO en Parizo**


Rakoen Maertens reprezentis TEJO-n kaj UEA-n en la Ĝenerala Konferenco de UNESCO en Parizo. Li parolis pri Esperanto, lingvaj baroj kaj lingva justeco. [...]

**Respondo de la Estraro de TEJO al la artikolo "La Centra Oficejo ekparolis angle"**

Pere de ĉi tiu komunikado, ni ŝatus oficiale respondi al la artikolo "La Centra Oficejo ekparolis angle", aperinta antaŭ kelkaj tagoj en Libera Folio. [...]

**Nia nova Eksterrilata Oficisto Quentin Weber-Seban**

Ekkonu nian novan Eksterrilatan Oficiston, Quentin Weber-Seban (Kventino)! Por kontakti lin: [gro.ojetnull@onitnevk](mailto:gro.ojetnull@onitnevk) El kiu lando vi estas? [...]



Mapo de Sumoistoj tra la mondo

## Leterojn ni ricevis el geamikoj



Kara samideano, Jam de kelkaj monatoj la brazila samideanino Nazaré Laroca plusendas en retpoŝtlisto viajn mesaĝojn kun la ligilo al Turka Stelo. Ĝis nun mi ne havis tempon por legi la revuon (mi nur foliumis ĝin), sed mi tuj vidis, ke ĝi ne estas amatora revueto. Pluraj aliaj Esperantaj revuoj ne estas pli grandaj ol Turka Stelo. Mi gratulas vin pro via grava laboro.

Pri mi vi povas legi ĉe <http://hawelk.wixsite.com/hawelker/mia-vivprotokolo>

Amike salutas

**Herbert A. Welker, el Brazilo**



Dankon, mi ricevis la novembran revuon kaj vidis, ke estas tre interesaj materialoj, kiujn mi nepre legos. Dankon ankaŭ por la aperigo de mia rakonteto, nun ĝi ŝajnas al mi bona.

Ĉion bonan!

**Elena Popova, el Bulgarujo**

## La 84-a Itala Kongreso de Esperanto

**Renato Corsetti, el Italujo**

**P**luraj kongresanoj diris kaj skribis en Fejsbuko, ke la itala kongreso de Esperanto estas malgrandskala kopio de la Universala Kongreso de UEA. Efektive multaj estas la similecoj: ĝi daŭras unu semajnon, ĝi havas abundan, eĉ tro abundan, programon, en kiu miksiĝas movadaĵoj, kulturaĵoj, ekskursoj, vesperaj programoj kaj junularaj programoj. Niaj gejunuloj ne pensas nur pri eŭropaj subvencioj laŭ la reganta modo en TEJO.

Ĉiukaze ĉi-jare la kongreso okazis en unu el la plej belaj regionoj de Italujo, Basilicata [bazilikata] laŭ la bordo de la Ionia Maro, kiu kondukas vin al Grekujo aŭ al Egiptujo. Fakte el Grekujo venis la unuaj civilizitaj koloniantoj de tiu parto de Italujo, kiu akiris la latinan nomon Magna Grecia = Granda Grekujo, ĉar en la daŭro de la tempo ĝi preterpasis la veran Grekujon en multaj kampoj. Ĉu vi scias, ke Pitagoras kaj Aristoteles vivis en suda Italujo? Konsiderante la lokon de la kongreso, precize Policoro [polikoro] en la provinco Matera, la kongresa temo flugis alten kaj invitis eŭropanojn pripensi dum momento sian kulturon kaj siajn kulturajn radikojn.

Sed tio ne estas facila iniciato en ĉi tiu periodo, kiam la konservativuloj regantaj en Bruselo pensas, ke estas pli oportune forgesi pri grekaj demokratio kaj filozofio, romaj juro kaj justa administrado, mezepokaj romantikismo kaj defendo de la plej malfortaj kontraŭ

la ĉie ĉeestantaj drakoj. Ili, tiuj konservativuloj, pensas, ke estas pli bone mem esti drakoj de la libera merkato kaj subpremi Grekujon, indiferenti pri la migradproblemoj de Italujo, fari decidojn favorajn al la plurnaciaj grandaj kompanioj, kaj subteni la militojn (ekzemple en Sirio), kiuj kaŭzas la elmigradon.

Estis du seminarioj, unu gvidata de Osmo Buller kaj unu alia gvidata de Lu Wunsch-Rolshoven.

La unua temis pri "Kulturo kaj komunikado en Eŭropo: Esperanto-gazetaro sub lupeo". Osmo Buller estas tia movada personeco, kiu ne bezonas prezenton ĉi tie. Li prezentis la historion de nia gazetaro. Esperanto fariĝis vivanta lingvo ne laste pro kaj per sia gazetaro. Pri ĝia neceso konsciis d-ro Zamenhof, kiu jam en 1889 lanĉis la gazeton La Esperantisto. Ekde tiam aperis centoj da landaj kaj internaciaj gazetoj, lokaj bultenoj kaj plej diversaj fakaj revuoj. Nuntempe ili tamen ŝajnas rapide malmultiĝi. Tute lastatempe renomaj gazetoj spertis gravajn problemojn: Esperanto de UEA multe malfruis kaj ofte ŝanĝis redaktorojn, Heroldo de Esperanto apenaŭ sukcesas restarti sub la nova posedanto, La Ondo de Esperanto ĉesis aperi papere. Ĉu niaj gazetoj havos estontecon en presita formo, se entute? Ĉu ili povos



adaptiĝi al la defio de Interreto, kaj kiel? En la seminario oni konatiĝis kun la historio de la Esperanto-gazetaro kaj klopodis trovi respondojn al tiuj demandoj. Osmo Buller estis helpata de Francisko Veauthey, kiu gvidis ekzercojn pri enpaĝigo de revuoj, kaj de Renato Corsetti kaj Anna Lowenstein pri la lingvaj aspektoj de revuoj.

La dua seminario temis pri: "De Informado kaj Konsciigo al Publikaj Rilatoj". Lu Wunsch-Rolshoven post pluraj taskoj en la germana kaj internacia movado ekde 2014 gazetara komisiito de Germana Esperanto-Asocio. Li verkis centon da artikoloj, ĉefe renkontiĝaj raportoj kaj pri publikaj rilatoj kaj varbado, kaj ofte prelegas pri tiuj temoj dum renkontiĝoj. En la seminario estis alfrontataj pluraj temoj rilate al informado kaj gazetaraj rilatoj. Lu klarigis kiel trakti kun ĵurnalistoj, ĉefe se ili havas antaŭjuĝojn al Esperanto, kaj ĝenerale prezentis sub nova lumo ĉiujn temojn rilatantajn al informado. Temis siaspece pri nova seminario de Frostavallen en kiu Lapenna diktis la liniojn pri informado en la 1950aj jaroj.

Cetere la informado pri Esperanto dum la kongresa semajno estis neniam spertita dum la lastaj jardekoj. Ĉar Basilicata estas regiono kun neniu esperantisto, ĉiuj lokaj ĵurnaloj senbridiĝis kaj aperigis tutpaĝajn artikolojn pri Esperanto. La loka televido kaj la lokaj radioj venis kaj intervjuis. El tiu vidpunkto tre interesa kongreso.

Ĉi-jare la kongreso okazis en la itala regiono Basilicata, kie sidejas kelkaj Literaturaj Parkoj, kuniĝintaj en la Instanco pri Literaturaj Parkoj, branĉo de la prestiĝa asocio Dante Alighieri. La oficiala oratoro en la kongreso, ambasadoro Giorgio Novello [ĝorĝo novelo], kunlaboras kun tiu ĉi instanco por

organizi ĝemelajn rilatojn inter italaj kaj norvegaj

parkoj. Ĉi-jare la evento malfermita al la publiko okazis en Literatura Parko, kaj oni prezentis la valoron kaj la rolon de la regiona literaturo por la plifortigo de la kulturaj radikoj. Marde posttagmeze de la 17.00 ĝis la 19.00 la kongresanoj estis gastoj de la Literatura Parko Carlo Levi [karlo levi], en Aliano, ne tre malproksime de la kongresejo. Carlo Levi, pentristo kaj verkisto (kies ĉefa romano estas Kristo haltis en Eboli / Cristo si è fermato ad Eboli) dum la faŝisma periodo estis ekzilita en ĉi tiu vilaĝo, malproksime de siaj lukto-kamaradoj. En la debato (itale kaj Esperante) rolis doktoro Stanislao De Marsanich, prezidanto de la Instanco pri Literaturaj Parkoj, profesorino Neria De Giovanni, prezidanto de la asocio de literaturaj kritikistoj, doktoro Raffaele Nigro, ĵurnalisto kaj plurfoje premiita verkisto, profesoro Carlo Minnaja, valora esperantisto en la kultura kampo, kelkaj bazilikataj verkistoj, kies verkoj estis elektitaj de profesoro Minnaja por la bazilikata antologio en Esperanto, kiu ankaŭ estis prezentata en tiu okazo. La tradukita literaturo en Esperanto estis prezentita de Anna Lowenstein.

Se vi aldonas trinivelajn kursojn pri Esperanto, ĉiuvesperajn spektaklojn (aparte kantis Kajto), junularajn programojn, la maron, kiu estis je kelkaj metroj, kaj la tre hel-bluan ĉielon, vi havas kompletan impreson pri la ĉi-jara kongreso.

Sed tio estas nur antaŭludo por allogi homojn al la venontjara itala kongreso de Esperanto en Sanmarino. Vi povas antaŭvidi maron en la apuda Rimini kaj kulturon en Sanmarino, kie organizos sian universitatan semajnon ankaŭ AIS. Do, pli da kulturo kaj pli da turismo mara kaj monta! Neniu povas nomi sin vera esperantisto, se li almenaŭ unu fojon en la vivo ne ĉeestis la italan kongreson de Esperanto.

**Renato Corsetti**

### INFORMITALE 218 - Oficiala inform-servo de Itala Esperanto-Federacio

Ĉu vi ŝatus senpage studi en universitato dum la Itala Kongreso de Esperanto en San-Marino?

Ĝuste tion ofertas la Asocio Internacia de la Sciencoj (AIS, <http://www.ais-sanmarino.org/>). Temas pri pluraj kursoj, okazontaj dum la Itala Kongreso de Esperanto en San-Marino venontsomere (18-25.8.2018), kadre de la tiel nomata "Sanmarineca Universitata Sesio" (SUS) n-ro 35. Vi povos studi pri lingvistiko, astronomio, sociologio, astrobiologio, esperantologio, matematiko kaj pli, laŭvole eĉ ricevi oficialan ateston de AIS.

Informiĝu kaj aliĝu en la paĝoj <http://kongreso.esperanto.it/85/>.

Niaj profesoroj atendas vin. <http://kongreso.esperanto.it/85/bonvenon.htm>

La LKK

\*\*\*\*\*

Informitale  
Itala Esperanto-Federacio -  
<fei@esperanto.it>  
Itala Esperantista Junularo -  
<iej@esperanto.it>  
via Villaresi, 38 I-20143 Milan  
Tel+fax +39 02 58100857  
<http://www.esperanto.it/>



**SAN MARINO KAJ ESPERANTO:  
MALGRANDAJ KOMUNUMOJ  
KAJ GRANDAJ VALOROJ**

85a  
**ITALA KONGRESO  
DE ESPERANTO**

## Zamenhof Tago - Libro Tago



**L**a Zamenhof tago (15-a de decembro) estas la naskiĝtago de L.L.Zamenhof (1859-1917), la iniciatinto de Esperanto, kaj la plej vaste celebrata festotago en la Esperanto-kulturo. En tiu tago esperantistoj tra la mondo okazigas specialajn renkontiĝojn por festi la okazon. La idearo de Esperanto kaj la proksimeco de la Zamenhof tago al Kristnasko instigas la kunvenintojn interŝanĝadi donacojn (prefere librojn verkitajn en Esperanto) kaj bondezirojn. Foje okazas dum tiaj kunvenoj ankaŭ prelegoj pri L.L.Zamenhof. La Esperanta Civito registras la Zamenhof tagon en sia konstitucio kiel la Tagon de la Esperanto-kulturo.

Kelkaj Esperanto-parolantoj, proponis celebradon de la 15-a de decembro anstataŭe kiel de Tago de Esperanto-literaturo (aŭ Tago de Esperanto-libro, Esperanto-Librotago). Tial ili kuraĝigas Esperanto-organizojn kiuj okazigas renkontiĝojn dum tiu tago aldoni libro-recenzon aŭ poem-deklamadon en la programon, aŭ anonci publikigon de nova libro. Aŭ, ĉe la nivelo de unuopulo, oni povas aĉeti libron aŭ komenci novan libron aŭ per simila taŭga maniero celebri la Esperanto-literaturon en tiu tago.

La tradicio devenas jam de la 1920-aj jaroj, kiam laŭ propono de diversaj intelektuloj kaj aktivuloj (interalie Julio Baghy kaj Nikolao Nekrasov), la 15-a de decembro estis elektita kiel Esperanto-festotago.

Fonto: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Zamenhofa\\_Tago](https://eo.wikipedia.org/wiki/Zamenhofa_Tago)



## Konciza biografio de LL Zamenhof

**1859**

3 (15) dec: En Bjalistoko (strato Zeljonaja 6) en la familio de Mordka (Mark Fabianoviĉ) kaj Liba Roŭla (Rozalia) Zamenhof naskiĝas ilia unua filo Lejzer (Lazarj) — Лазарь Маркович Заменгоф.

**1869**

Aŭgusto: Eklernas en la unua klaso de la reala gimnazio en Bjalistoko, sed post du monatoj forlasas la lernadon pro malsano.

**1870**

Aŭgusto: Denove eklernas en la unua klaso.

**1873**

Aŭgusto: Eklernas en la kvara klaso, sed la lernado daŭras nur kvar monatojn.

Decembro: La familio Zamenhof ekloĝas en Varsovio (strato Nowolipie 28).

**1874**

Aŭgusto: Eklernas en la kvara klaso de la Varsovia 2a vira gimnazio.

**1878**

5 (17) dec: Festado de la naskiĝo de Lingve Uniwersala.

**1879**

Majo-junio: Ekzamenoj en la lasta (oka) klaso de la gimnazio.  
15 (27) jun: Ricevas la abituriantan ateston kaj arĝentan medalon en la gimnazio.



## verkis Aleksander Korjenkov

Aŭgusto: Aliĝas al la medicina fakultato de la Moskva Universitato.

Septembro: Ekstudas en la Moskva Universitato.

**1880**

Pretigas gramatikon de la jida lingvo.

**1881**

1 (13) mar: Murdo de la imperiestro Aleksandro II. La situacio en Ruslando malstabiĝas.

Majo: Plenumas ekzamenojn en la Moskva Universitato kaj decidas ekŝiĝi el ĝi kaj eklerni en Varsovio.

Somero: Pretigas du kajerojn de Lingvo Universala.

Septembro: Ekstudas en la tria studjaro de la medicina fakultato de la Varsovia Universitato.

**1882**

Januaro-februaro: Artikolo Kion do finfine fari? en la ruslingva juda semajnjurnalo Razsvet.

Februaro: Fondas la pracionistan societeton Ŝeerit-Israel.

26 mar (7 apr): Artikolo Sub la komuna standardo! en Razsvet.

Aŭgusto: La tria kajero de Lingvo Universala.

**1883**

18 aŭg: Kunfondas la Varsovian grupon de Ĥibat-Cion kaj elektiĝas kiel la prezidanto de ĝia plenumkomitato.

18 (30) nov: Letero al la anoj de la junulara socialisma juda grupo Bilu.

**1884**

Jarfino: Fino de la universitataj studoj.

**1885**

Februaro-majo: Kuracisto en Veisiejai.

Majo-novembro: Kuracisto en Varsovio (Muranowska 34). Staĝado en la oftalmologia fako de la Varsovia juda malsanulejo.

Decembro-majo 1886: Okulkuracisto en Płock.

**1886**

Majo-junio: Studado kaj staĝado en Vieno.

Julio: Okulkuracisto en Varsovio (Muranowska 40).

Aŭtuno: Konatiĝo kun Kejla (Klara) Zilbernik.

**1887**

18 (30) mar: Gefianĉiĝo de Lazarj Zamenhof kaj Klara Zilbernik.

21 maj (2 jun): Permeso por la presado de la Unua Libro en la rusa lingvo.

14 (26) jul: Permeso por la enmondigo de la Unua Libro.

Ĉi tiu tago estas konsiderata kiel la naskiĝdato de la lingvo.

9 aŭg: Geedziĝo. La geedzoj ekloĝas en la strato Przejazd 9.

Aŭtuno: La franca, germana kaj pola eldonoj de la Unua Libro.

**1888**

Januaro: Dua Libro de l' lingvo internacia.

30 maj (11 jun): Naskiĝo de Adam Zamenhof.

12 (24) sep: Petas la Ĉefan Administracion pri Presaferoj permesi eldonon de ĉiusemajna gazeto La internaciulo.

3 (15) okt: La peto pri La internaciulo estas rifuzita.

**1889**

Januaro-februaro: Plena vortaro rusa-internacia kaj Meza vortaro internacia-germana.

1 sep: La unua numero de La Esperantisto.

Novembro: Establiĝo kiel okulkuracisto en Ĥerson.

1 (13) dec: Naskiĝo de Sofia Zamenhof.

**1890**

25 mar: Fondo de la Ligo internacia de Esperantistoj.

Majo: Reveno al Varsovio (Nowolipki 21).

Aŭtuno: En la lernolibro Vsemirnyj jazyk Esperanto estas presita La Espero en Esperanto kaj en la rusa lingvo; ĝi fariĝos himno esperantista.

Decembro: La Ligo ĉesas sen ekfunkcii.

**1891**

Decembro: Decidas interrompi la eldonadon de La Esperantisto, sed Wilhelm Heinrich Trompeter surprenas la eldonkostojn kaj asignas al Zamenhof redaktoran salajron.

**1892**

19 (31) aŭg: Morto de Liba Roĥla Zamenhof.

**1893**

Januaro: Fondo de Internacia Ligo Esperantista, kun Zamenhof kiel la sekretario.

Aŭgusto: Universala Vortaro.

Oktobro: Transloĝiĝo al Grodno.

**1894**

Januaro: Komencas publikigi en Esperantisto projekton pri reformoj en Esperanto.

Aŭgusto-septembro:

Ekercaro kaj Hamleto.

15 nov: Voĉdona malakcepto de la reformprojekto.

**1895**

15 aŭg: La lasta (1895, №5-6) numero de Esperantisto.

Zamenhof por kelkaj jaroj ĉesigas preskaŭ ĉiujn Esperanto-okupojn.

**1896**

Esploras kun Vilhelm Ŝenberg la vidkapablon de ĉiuj lerneĵanoj en Grodno.

**1897**

Oktobro: Reveno al Varsovio (Dzika 9).

**1898**

Januaro: En Francio estas fonditaj Société pour la Propagation de l'Espéranto kaj la revuo L'Espérantiste.

**1900**

3 aŭg: Louis de Beaufront prezentas Esencon kaj estontecon en Parizo.

**1901**

Aprilo: Hilelismo. Projekto de solvo de la hebrea demando.

6 aŭg: Kontrakto kun Hachette.

**1902**

Zamenhof iom post iom revenas al Esperanto-aktivado.

**1903**

Novembro: Fundamenta Krestomatio.

**1904**


16 (29) jan: Naskiĝo de Lidia Zamenhof.

**1905**

9 (22) jan: Komenco de la Unua Ruslanda Revolucio.

Julio: Fundamento de Esperanto.

29 jul: Nomumita kiel kavaliro de la Honora Legio.



5–12 aŭg: La 1a Universala Kongreso de Esperanto (UK) en Bulonjo-ĉe-Marco.

#### 1906

Januaro: Dogmoj de hilelismo en Ruslanda Esperantisto.

Marto: Homaranismo.

27 aŭg – 5 sep: La 2a UK en Ĝenevo.

Septembro: La unua numero de La Revuo.

15–23 okt: Partoprenas konsultiĝon de lingvoreformistoj en Bruselo kaj Parizo.

#### 1907

12–17 aŭg: La 3a UK en Kembriĝo.

15–24 okt: La Delegacia Komitato kunvenas en Parizo kaj akceptas Esperanton kun modifoj.

30 nov: Morto de Mark Fabianoviĉ Zamenhof.

La Revizoro (Gogol).

#### 1908

18 jan: Rompo de la kontaktoj kun la Delegacio.

16–22 aŭg: La 4a UK en Dresdno.

Ifigenio en Taŭrido (Goeto), La rabistoj (Ŝillero), Georgo Dandin (Moliero).

#### 1909


5–11 sep: La 5a UK en Barcelono.

#### 1910

20–25 apr: La 1a Ruslanda Esperantista Kongreso en Sankt-Peterburgo.

14–20 aŭg: La 6a UK en Vaŝingtono.

Marta (Orzeszko), Lingvaj Respondoj, Proverbaro



Esperanta.

#### 1911

26–29 jul: Kongreso de rasoĝ en Londono.

20–27 aŭg: La 7a UK en Antverpeno.

#### 1912

11–18 aŭg: La 8a UK en Krakovo.

#### 1913

Majo: Homaranismo (unufoje kun la vera nomo).

24–31 aŭg: La 9a UK en Berno.

#### 1914

30 jun: Rifuzas aliĝi al la Hebrea Esperanto-Asocio.

1 aŭg: Germanio deklaras militon al Ruslando. La geedzoj Zamenhof estas haltigitaj en Kolonjo survoje al la (neokazinta) 10a UK.

15 aŭg: Reveno al Varsovio post longa ĉirkaŭvojo.

18 okt: Projekto de Kongreso de neŭtrale-homa religio.

Decembro: Alvoko al la diplomatoj Post la Granda Milito.

#### 1915

3 mar: Fintraduko de la Malnova Testamento.

Marto: Komencas traduki fabelojn de Andersen.

Julio: Transloĝiĝo al Królewska 41.

Proponas porĉiaman revizion de Esperanto.


#### 1917

15 feb: La lasta versio de la homaranismo.

Marto: Ekverkas la eseon Pri Dio kaj pri senmorteco.

14 apr: Morto.

16 apr: Entombigo.



Kompilis **Aleksander Korĵenkov**

Korĵenkov A. Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L.L. Zamenhof. — 2a eld. — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2011, p. 332-335. Konkiza biografio de Lazarj Markoviĉ Zamenhof: Novaĵretejo La Balta Ondo <http://sezonoj.ru/2017/04/zamenhof-14/>

## Hispaneska Divorco

[el.egalecen.org](http://el.egalecen.org)

### **A** Analizo de la situacio en Katalunio

*Ĉi tiu estas gastartikolo de Nicolau Dols, profesoro de Kataluna Filologio ĉe la universitato de la Balearoj. Foto 'catalonia' de cobalt and chrome, uzita laŭ CC BY-NC 2.0.*

'Mi murdis ŝin ĉar ŝi estas mia' ("La maté porque era mía") estas konata hispana diraĵo, eble

karikatureska. Ekzistas popola kanto kiu plilongigas ĝin per "La maté porque era mía, / y si volviera a nacer / otra vez la mataría" (Mi murdis ŝin ĉar ŝi estas mia, / kaj se ŝi denove naskiĝus / denove mi murdus ŝin). Tango, filmo, kaj multe da kulturaj esprimoj, moke aŭ ne, baziĝas sur ĉi tia diraĵo. La signifo de la esprimo estas "mi tute rajtis murdi ŝin ĉar ŝi estas mia





posedaĵo". Kompreneble ĉi tiu elpenaĵo ne estas ekskluziva propraĵo de hispana kukturo, kaj ne plu validas nuntempe en tiu kulturo nek en aliaj... sed tamen ĝi reaperas iam tiam en sinteno de krimuloj.

Disiĝo neniam estas facila ago en paroj, kaj eĉ ĝi tute maleblis en tradiciaj socioj kie gravaj

sentoj de falsa (ekde nia nuntempa starpunkto) honoro estis la supranivela esprimo de rilatoj konstruitaj kiel posedaj: se virino apartenas al viro, disiĝon deciditan de virino viro spertas kiel frakason de sia posedaĵo. La argumento "divorco nur devas okazi kiam ĝi estas konsentita de ambaŭ partneroj" ne konvenas al socio en kiu homoj estas ĉiuj egale plenrajtaj, kaj estas aldonaĵo de eble leĝa, sed tamen ne justa, ŝarĝo de sufero al la pli malforta partnero.

La hispana konstitucio de 1978, ankoraŭ valida, ne agnoskas la rajton de memdetermino de la popoloj de Hispanio, kaj deklaras la "maldissolveblan unuecon de la hispana nacio, komuna patrujo de ĉiuj hispanoj" (art. 2). Tamen, la artikolo 10 de la sama bazleĝa teksto deklaras ke oni devas interpreti akgnoskatajn rajtojn surbaze de internaciaj paktoj subskribitaj de Hispanio. Pravas ke Hispanio subskribis en 1977 la Internacian Pakton pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, lanĉitan de Unuiĝintaj Nacioj per Rezolucio 2200A (XXI) de 1966 kaj valida ekde 1976, kaj ke ĉi tiu pakto deklaras (art. 1) ke "Ĉiuj popoloj havas la rajton memdetermini". Pravas ankaŭ ke pro tio ke memdetermino ne estas agnoskata kiel konstitucia rajto oni ne povas pretendi interpreton de ĝi laŭ internacia juro.

La 6an de Septembro de 2017 la Parlamento de Katalunio ('aŭtonoma komunumo' laŭ la hispana konstitucio) voĉdonis favore la Leĝon pri Referendumo pri Sendependiĝo de Katalunio, meze de forta krizo kun la hispana registaro, kiu emis ĉesigi ĉiujn agojn rilatajn al la organizado de popola balotado, afero pri kiu la konstitucio ne antaŭvidas. Sekvis arestado de politikistoj akuzataj de organizi referendumon, kontrolado de financoj de la kataluna registaro por eviti elspezojn rilatajn al la aĉeto de balotiloj kaj balotujoj, fortaj minacoj de monpunoj (ĝis 300.000€ kontraŭ civitanoj partoprenantaj en balotkomisionoj), sendo de miloj da policistoj al Katalunio, ktp.

La hispana registaro nur ofertis eblon diskuti pri

sendependiĝo de Katalunio en la hispana parlamento. La oferto fontas el la baza ideo, milfoje ripetita, ke sendependiĝon de Katalunio ne povas decidi nur la katalunoj, kaj ke la plejparto de la hispanoj devas ĝin konsenti. Do, ni revenas al la jam konata muziko pri malkonsentita divorco: divorco ne eblas se la plej pova partnero ne konsentas ĝin<sup>1</sup>. La diskurso kompletigas per asertoj pri kion volas "ĉiuj la hispanoj". Ŝajnas ke nur la hispana registaro povas interpreti ties volon, kaj en tiu ĉi totalo oni inkluzivas ankaŭ la katalunojn. Do, tipa nuligado de sendependa volo de partnero aperas ĉi tie ("Vi silentu, ĉar mi jam scias kion vi volas kaj bezonas").

La ĉefa kaj ununura argumento de la hispana registaro estas ke la referendumo ne estas laŭleĝa. Tamen, ĝi ankaŭ ne estas krimo... sed kvazaŭ krimulojn oni persekutis ne nur la organizantojn, sed ankaŭ partoprenantojn en la voĉdonado. Facile troveblas retaj atestiloj de perforto fare de hispanaj policistoj kaj militistoj (ne forgesu ke "Guardia Civil" estas militista korpuso), forte armataj kaj kirasataj. La rakontoj pri la ago de ĉi tiuj korpusoj estas teruregaj. La tagon kiam mi ĉi tion verkas, du tagojn post la atakoj, la kataluna ministerio pri sano parolas pri pli ol 800 vunditoj. Ili ne estas fortikaj homoj, kiuj eble perforte kontraŭstaris policon, tute ne: centoj da filmetoj montras sturmtrupojn atakantajn per klaboroj kaj gumpafaĵoj (gumpafaĵoj estas malpermesataj en Katalunio ekde 2014) malarmitajn kaj eĉ feblajn civilulojn enviciĝintajn por baloti. Multas la bildoj de homoj videble ne kapablaj elteni fizikan atakon, ĉefe maljunuloj kaj virinoj, ĵetitaj surplanken kaj trenitaj de policistoj per hararo aŭ busxo.

Dume, Eŭropo silentas, kiel oni silentas kaj nenion faras kiam sentas batojn kaj kriojn en apuda domo. Ĉu ni sekvu la konsilon "Ne ŝovu nazon en fremdan vazon" eĉ kiam ni scias kio okazas? Ĉu ni rajtas ŝajnigi nin surduloj? Ĉu ni ne estas komplicoj de murdisto se ni nenion faras? Kion diros la krimulo? Ĉu "mi batis ilin ĉar ili apartenas al mi", samkiel "Mi murdis ŝin ĉar ŝi estas mia"? Eble ni povus trankvile atendi, komforte atendi legadon de la morgaŭaj novaĵoj apogante kapon sur litkusenon kie oni brodis "Ni vivos, ni vivos". Tute bone, kaj eĉ leĝe, sed ankaŭ morale malice! "Ni vivos, ŝi ne plu... ĉar ŝi estis lia".

<sup>1</sup> Ekzemple en ĉi tiu artikolo.

<sup>2</sup> Bonvolu legi la artikolon pri "Mansplaining" en tiu ĉi blogo por kompreni kion mi celas klarigi.

Fonto: <https://egalecen.org/2017/10/11/hispaneska-divorco/comment-page-1/#comment-506>

**Ĉ**u povus esti la mondo sen la virinoj? Ĉu povus esti en la mondo amo, amoro, ĝojo, prospero sen virinoj? Kompreneble ne kaj ne kaj ne, kompreneble nenio povus esti en la mondo, precipe sen la homa, nu, sen la virina beleco!

Kontraŭe al la difarita, natura, unika, tamen senanima belo, devis stari la same unika beleco de la divers-speciaj vivuloj. Estas pruvite de la abundo da seneraraj praaj mitoj kaj historioj, ke sola kontraŭpezo de la natura belo estas la vivula, ĉefe la homa beleco.

Mi jam diris, ke tiu homa karakterizaĵo, la beleco, apartenas al la virinoj; al la viroj apartenas alia, preskaŭ same signifa karakterizaĵo, la forto, la korpa, ne la mensa, forto.



Estas sciate, ke la antikvaj dioj, ĉu por ludi, ĉu por eviti la enuon, kreis la homojn, tamen ŝajnas, ke, post nelonge, la kreintoj komprenis, ke iliaj kreitaĵoj iom-post-iome komencis, almenaŭ sentimentale, influ iilian dian rezoneblon. En la komenco, la unu post la alia, viraj kaj inaj dioj, duondioj, diidoj kaj ĉiaspecaj diaĵoj komencis enamiĝi al belaj mortemuloj kaj mortemulinoj. Tio ŝajnis agrabla, gajiga, distra, eĉ interesa “okupo”, tamen sekvis kelkaj komplikaĵoj, ĉar gedioj naskis kaj generis mortemajn idojn kaj tio post nelonge kaŭzis kontraŭiĝojn, konfliktojn eĉ kverelojn en la ordinare trankvilaj diaj restadejoj. La afero iĝis vere danĝera, kiam kelkaj dioj komencis montri apartan intereson, eĉ amon, ne al siaj propraj mortemaj idoj, sed al la tuta homa gento. Tio, kompreneble, ne povis resti ekster la atento de la direĝo Zeŭso (Ζεύς), kiu ne povis toleri tian konduton.

La afero eksplodis, kiam Prometeo (Προμηθεύς), unu el la Titanoj (Τιτάνες), ĉu pro amo al la homoj, ĉu pro malamo al Zeŭso, la venkinto de la Titanoj, ŝtelis de Hefesto (Ἥφαιστος) la fajron kaj de Atena (Αθηνά) la saĝecon kaj kaŝe donacis ĉion tion ĉi al la homaro. Tiu kontraŭzeŭsa ago estis fatala por Prometeo, sed ankaŭ por la homaro. La trudita puno al Prometeo estis eksterordinare senindulga, tamen ankaŭ la puno

de la homoj estis same severa.

Pri Prometeo eble mi parolos per alia artikolo, nun mi pritraktas la suferojn de la homoj, kaŭzitaĵn de la dia puno.

Notinde, ke ĝis tiam, en la homa mondo regis plena paco kaj sereneco, ĉar la homoj (probable nur viroj) ĝuis ekskluzive bonaĵojn. Ĝis tiam, ideo pri malbono ne estis; la homoj vivis en la medio de tio, kion, multe pli poste, oni nomis “paradizo”.

Jen, do, kion faris Zeŭso. Li unue ordonis Hefeston, knedi el argilo, diindece belegan virinon. Poste, li donis vivon al la vere belega dia faritaĵo, kaj tiele naskiĝis, pli ĝuste, venis en la mondo, Pandora, la unua vera virino (laŭ aliaj la unua virino). Mi preferas tiun “vera virino”, ĉar Zeŭso ordonis al ĉiuj diinoj, inspiri al Pandora, estigi en ŝia menso, animo kaj korpo ĉiujn siajn proprajn karakterizaĵojn, ecojn, inklinojn, talentojn, ĉion diinan!

Ĉu ĉar ŝi ricevis ĉiujn donacojn de la diinoj, ĉu ĉar ŝi alportis al la homoj ĉiujn diajn donacojn, Pandora ricevis sian nomon, ĉar en la helena lingvo “pan” (πᾶν) signifas “ĉio” kaj “doro” (δῶρον) signifas “donaco”.

Do, la per ĉio dotita virino estis kondukita de Hermeso (Ἑρμής) al la homa mondo, tamen, portante ankaŭ en fermita skatolo (eble korbego) la senditajn de Zeŭso donacojn al la homaro; tio estis la valora bagaĝo de Pandora.

Tiuj donacoj estis ĉiuj malbonaĵoj, ĉio, kio ĝis nun turmentas kaj eterne turmentos la homan specion. Estis malsanoj, doloroj, suferoj, estis malĝojo, ĉagreno, estis malkonsentoj, malamo, perforto, milito, morto, estis ĉio tia!

Pandora, ne sciante kion ekzakte alportis al la homoj, malfermis plenĝoje sian skatolon por montri la donacojn al siaj egaluloj kaj tiam ĉio elĵetiĝis, elfluis kaj etendiĝis en la tutan homan mondon, do, en nur unu momento ĉio estis farita!

Tamen, oni diras, ke la pli danĝeraj, la kaŝitaj kaj plej fatalaj “donacoj” de Zeŭso estis la ecoj inspiritaj de la diinoj al Pandora kaj de tiu lasta al ĉiuj ceteraj virinoj, tiamaj kaj ĉiamaj. Mi klarigu ke temas pri diversaj objektoj. Estas ja la ĉarmo, la beleco, la amemo, la prudento, la sindonemo, tamen ankaŭ obstino, envio, ruzeco, artificeco, ĵaluzo, venĝemo, estas tio kaj alio, tamen, oni pardonu al mi ke mi ne



povas paroli pri pliaj tiaj virinaj ecoj, ĉar, kiel sudulo, mi multe amas la virinojn. Mi nur diros, ke Pandora alportis senvole al la virinoj, do al la tuta homaro, tre utilajn sed ankaŭ tre danĝerajn, eble ankaŭ kelkajn terurajn donacojn.

Mi aldonu ankaŭ ion kuraĝigan, ke en la fundo de la fatala skatolo de Pandora restis nur io, eble de alia, nekonata mano, ne de la mano de Zeŭso, metita, io treege signifa, kaj tio estas la espero, armilo tre forta kaj valora por la homoj.

Kaj por kunligi tiun ĉi mian rakontadon kun ĉio dirita en la komenco pri la virinoj, mi diru, ke, eble pro tiu donac-portanta Pandora, kompreneble tute maljuste, multaj akuzas pri ĉio la virinojn, la tutan virinan sekson. Memoru, ke laŭ antikvhelena popoldiro, ĝis nun uzata en mia patrujo, la tri plej

danĝeraj objektoj en la mondo estas "fajro, virino kaj maro" (πυρ, γυνή και θάλασσα), kaj se mi ĝuste scias tion, preskaŭ similan sencion havas tiu franca kaj vere internacia "chercher la femme" (serĉu la virinon).

Tamen, ĉio tio ĉi estas superflua stultaĵo, ni lasu la virinojn trankvilaj, ni diru, ke pri ĉio kulpas Pandora!



verkis **Spiros Sarafian** el Grekujo

## Patro kaj filo (2/2)

**M**algranda-Snjolfur metis sian ĉapon sur la butiktablon kaj eniris.

"Nu do, mia knabo?" demandis la komercisto.

Al Malgranda-Snjolfur venis sento de senkuraĝiĝo kaj li emis forlasi sian intencon. Sed li fortigis sian animon kaj diris:

"Vi scias, ke nia albordejo estas pli bona ol la feroana albordejo de vi."

La komercisto spontane ridetis pro la kvieteco kaj severeco de la knabo.

"Jes, mi aŭdis tiun onidiron" li respondis.

"Se mi donus al viaj feroanoj permeson por uzi nian albordejon dum venonta somero - kiom multe vi volas pagi al mi por tio?"

"Estas pli bone, ke mi aĉetos de vi la terlangon, ĉu ne?" demandis la komercisto kaj klopodis kaŝi sian rideton.

"Ne" diris Malgranda-Snjolfur "ĉar tiam mi ne havos hejmon."

"Vi ne povos loĝi tie - ĉar la komunumo ne donos permeson al vi."

"Mi intencas konstrui alian kabanon en venonta somero, ĝis tiam mi loĝos en ŝirmejo kiun mi jam faris. Sed mi jam perdis Snjolfur kaj la boateton, tiel ke mi ne povas remi por fiŝkaptado. Tial mi volas lui al vi la albordejon por viaj feroanoj, se vi volas iom al mi pagi. De tie ili povos remi en blovo el pliaj direktoj. Ĉu vi memoras kiomfoje ili devis sidi hejme dum pasinta somero, kvankam ni povis remi? Estis ĉar ilia albordejo estis multe pli malbona ol la nia, diris Snjolfur al mi."



## islanda rakonto de Gunnar Gunnarsson

"Kiom vi volas por la albordejo dum venonta somero?" demandis la komercisto.

"Tiom multe ke sufiĉas por funebra ceremonio de Snjolfur."

"Mi konsentas. Mi zorgos pri la ĉerko kaj la tuto. Vi povas esti trankvila rilate tion."

La komercisto iris al la pordo kaj intencis malfermi ĝin por li, sed Malgranda-Snjolfur sin ne movis - estis evidente ke la afero ne estis finita.

"Kiam venos la ŝipo kun la varoj al vi?" li demandis penseme kaj severe kiel antaŭe.

"Postmorgaŭ, mi kredas" respondis la komercisto.

Kion li volas rilate tion, li pensis kaj rigardis la dekdujaran knabeton kun mieno kvazaŭ li estus solvanta enigmo.

"Ĉu mankas al vi knabo en la butiko kiel pasintan someron?" demandis Malgranda-Snjolfur kaj kviete rigardis lin rekte al la okuloj.

"Jes, sed prefere li devas jam havi dekkvar jarojn" diris la komercisto ridetante.

"Ĉu vi volas iri kun mi eksteren antaŭ la butikon?" diris Malgranda-Snjolfur. - Ŝajnis ke li estis preparita por la respondo.

La komercisto iris ridetante post li el la butiko kaj al la grua kresto ĉe la marbordo.

Malgranda-Snjolfur silente iris antaŭ li al ŝtono, kiu tie kuŝis, li prenis ĝin kaj rektigis sin kun la ŝtono en la brakoj kaj jetis ĝin de si. Poste li turnis sin al la komercisto kaj diris:

"Tion la butikknabo, kiu estis ĉe vi dum pasinta somero, ne povis. - Mi ofte vidis lin provi."

La komercisto ridis varmece.

"Ĉar vi estas tiel forta, do eblus uzi vin, kvankam vi ne estas dekkvarjara" diris la komercisto.

"Kaj ĉu mi ricevos nutraĵon, kiam mi restos ĉe vi,



kaj la saman salajron kiel li ricevis?" demandis Malgranda-Snjolfur.

"Jes, tio do estas memsekva" respondis la komercisto.

"Estas bone, la komunumo ne devas zorgi pri mi" respondis Malgranda-Snjolfur kaj lia animo kvietiĝis multe. "Se oni havas nutraĵon kaj vestojn oni ne bezonos helpon de la komunumo" li aldonis.

Li levis la ĉapon kaj donis la manon al la komercisto, kiel li vidis Maljunan-Snjolfur fari.

"Adiaŭ" li diris. "Mi venos ne morgaŭ, sed postmorgaŭ."

"Venu en la domon kun mi por momento" diris la komercisto kaj iris antaŭ li kaj al la pordo de la kuirejo, invitis lin eniri kaj alvokis la servistinon:

"Ĉu vi povos doni al tiu ĉi knabeto iun nutraĵon?"

Malgranda-Snjolfur skuis la kapon neante.

"Ĉu vi ne estas malsata?" demandis la komercisto.

"Jes" respondis Malgranda-Snjolfur - li preskaŭ ne povis paroli, kaj la bona manĝodoro pliegigis lian malsaton, sed li kontrolis sin - "sed estas almozo, kaj tion mi ne volas akcepti" li diris.

Venis stranga serioza mieno sur la vizaĝon de la komercisto. Li iris al la infano, karesis lian kapon, donis signon al la servistino kaj prenis la knabon kun si internen.

"Ĉu vi neniam vidis ke via patro donis al konatoj glaseton da brando, kiam ili vizitis vin - aŭ tason da kafo?"

"Jes" diris Malgranda-Snjolfur.

"Do, vi vidas, knabo, oni devas doni al siaj gastoj ion bongustan. Kaj se la gastoj ne volas akcepti tion, la konateco fluas for. Tial vi devas manĝi kun mi, mi diras, ĉar vi estas gasto ĉi tie, kaj ni interkonsentis pri gravaj aferoj, kiuj povos ne plenumiĝi se vi ne akceptos ordinarajn regalaĵon de mi."

"Nu do, mi devas akcepti - devas esti tiel" diris Malgranda-Snjolfur.

Kaj li rigardis antaŭ si por momento profunde pensante, kaj fine diris:

"Oni devas nur zorgi pri tio, pagi al ĉiuj ĉion kaj neniam ŝuldi ion al iu ajn kaj fidi al la providenco."

"Jes, tio estas tute vera" diris la komercisto. - Sed tiam li devis ekpreni sian naztukon, ĉar li samtempe ploris kaj ridis.

"Li similas al la modelo" li murmuris mallaŭte. Li frapetis la ŝultron de Malgranda-Snjolfur kaj diris laŭte:

"Dio benu vin, mia knabo!"

Malgranda-Snjolfur miris, kiam li vidis la komerciston emociiĝi ĝis larmoj.

"Snjolfur neniam ploris" li diris.

Kaj tuj poste li aldonis:

"Mi ankaŭ neniam ploris de kiam mi estis infano. ... Mi emis plori kiam mi sciis ke Snjolfur estas morta. Sed mi timis, ke tio ne estus laŭ lia volo. Tial mi trankviligis min ...

Post momento kuŝis Malgranda-Snjolfur plorante en brakumo de la komercisto...

verkis: **Gunnar Gunnarsson**

tradukis : **Pétur Yngvi Gunnlaugsson**

fonto: [http://www.ismennt.is/vefir/esperant/la\\_tradukisto/esperanto/hejmen\\_01.htm](http://www.ismennt.is/vefir/esperant/la_tradukisto/esperanto/hejmen_01.htm)

## Alloga Turkio

**A**ntaŭ 52 jaroj mi vojaĝis la unuan fojon al Turkio. Tiama amikino kaj mi intencis ekkoni Turkion kaj Grekion. Germano kaj germanino, ni prenis trajnon en Germanio kaj veturis dum tri tagoj ĝis Istanbulo. Tie ni evidente vizitis la famegajn monumentojn Hagia Sofia, Blua Moskeo kaj la palacon Topkapi kaj ankaŭ promenis en la plej granda bazar. Ĉar ni (gestudentoj) havis malmulte da mono, ni ne prenis taksion (almenaŭ ne la normalajn), sed vizitis la urbon piede. Tamen poste ni eksciis, ke ekzistis la tiel nomataj taksioj "dolmuŝ", t.e. taksioj kiuj kunprenas 2, 3, 4 aŭ kvin pasaĝerojn kiuj ne sin konas, sed petas, ke la taksio ilin kunveturigas.

## sendis Herbert A Welker, el Bazilo

Pro tio tiuj taksioj estas tre malmultekostaj.

Mi ne memoras multajn detalojn, sed bone memoras, ke ni ŝatis manĝi sur unu el la urbaj pontoj la freŝe kaptitajn kaj frititajn fiŝojn. Tio – kaj la vivo en Turkio ĝenerale – estis novega kaj interesega por ni.

Post kiam ni estis vizitintaj Istanbulon dum kelkaj tagoj, ni prenis buson je la azia flanko de la Bosporo (la mar-kolo kiu apartigas Eŭropon disde Azio) por veturi al Bursa, kiu estis la ĉefurbo de la Otomana (aŭ Osmana) Imperio de 1326 ĝis 1368. Tie ni vizitis la faman kaj belegan Verdano Moskeon, la tomban



monumenton de Sultano Mehmed la 1-a kaj du aŭ tri aliajn vizitindaĵojn.

La sekvan tagon ni daŭrigis nian vojaĝon direkte al Izmiro (Smirno): 330 kilometrojn. Mi memoras, ke kiam la buso haltis mallonge kaj ni volis manĝi ion malmultekostan, la proprietulo de la simplega restoracio sugestis frititajn ovojn kun tomatojn. Neniam antaŭe ni estis manĝintaj tion, sed ni tre ŝatis la manĝaĵon, kaj fakte ĝis hodiaŭ mi preparas ĝin kelkfoje por mi.

Izmiro estas nuntempe la tria plej granda turka urbo, sed mi ne scias, ĉu ĝi jam estis la tria antaŭ 50 jaroj. Ĝi estas antikva urbo, sed havas nur malmultajn antikvajn vizitindaĵojn. La fama antikva urbo Efezo ne situas tre malproksime da Izmiro, sed bedaŭrinde ni ne disponis tempon por veturi tien.

En la porto de Izmiro ni prenis malgrandan ŝipon direkte al grekaj insuloj.

Turkio plaĉis tiom al mi (kaj mi sciis, ke la lando havas tiom da vizitindaĵojn), ke poste – hejme en Germanio – mi revis pri fari vojaĝon tra la tuta lando kaj eĉ planis ĝin detale. Malbonŝance mi ne povis realigi tiun revon.



La duan fojon mi vizitis “pecon” de Turkio en 2010, kiam mi kaj mia edzino faris grupan vojaĝon sur la Egea Maro kaj havis la oportunon viziti Efeson (vidu “Efeso” en Vikipedio) kaj proksime de ĝi la „Domon de Patrino Maria” (aŭ de la Sankta Virgulino) - Meryem Ana Evi en la turka.



La sekvan jaron ni haltis en Istanbul dum vojaĝo al Hindio. Tiun fojon mi povis montri la urbon al mia edzino, revidi la vizitindaĵojn kiam mi jam konis

kaj ekkoni aliajn. Ekzemple ni faris belan ŝipveturadon sur la Bosporo kaj vidis kelkajn belajn palacetojn kaj domojn ĉe la eŭropa flanko.

Fine ni faris en 2013 grupan vojaĝon al la ankaŭ tre fama regiono Kapadokio. Aviadile ni iris al Antalya kaj poste per buso al Konjao (vidu “Konya” en

Vikipedio), la urbo de Rumi (vidu „Ĝalal-ed-din Mohammad Rumi“ en Vikipedio), kie ni vizitis la muzeon Mevlana kaj la moskeon, en kiu troviĝas la maŭzoleo de la fama mistikulo kaj poeto.



Ni daŭrigis la vojaĝon ĝis Ürgüp, kie ni faris belegan flugon en varmaera balono super mirinda pejzaĝo kaj foje treege proksime al la strangaj rokoj kiuj abundas en tiu regiono.



En la sama regiono ni vizitis la tiel nomatajn “kamentuboĵn de feinoj”, kiujn aliaj nomas “falusajn rokojn”, en la “Valo de Amo”.



Alia tre interesa fakto en tiu regiono estas la kavoj, en kiuj pasintecce loĝis homoj.




En Kapadokio ekzistas ĉirkaŭ 40 subteraj urboj. Ni vizitis unu el ili en Özkanak: eksterordinara. Kiel eblis vivi sub la tero en malgrandaj ĉambroj interligitaj per mallarĝaj kaj malaltaj koridoroj? La urbo havas dek etaĝojn ĝis profundo de 40 metroj.



(La dekstra foto montras grandegan ŝtonon, per kiu oni fermis la koridoron.)

Ankaŭ eksterordinara estas la subĉiela muzeo de Göreme. En ĝi ekzistas pluraj antikvaj eklezioj konstruitaj inter la 4-a kaj la 9-a jarcento en kavoj.



Ankoraŭ hodiaŭ oni vidas belajn freskojn en kelkaj el ili.

Evidente en Turkio ne povis manki vizito al prezentaĵo de turniĝantaj derviŝoj, kiun ni ĉeestis en Avanos.

Ni vizitis ankoraŭ aliajn interesajn kaj belajn lokojn, sed mi ne povas mencii ĉiujn ĉi-tie.

Vere Turkio estas tre alloga lando.



## Fabelo pri Nigra Bagnulo

**U**u tagon viro kuŝiĝis sur la varman herbon en la kampo por ripozi. Tiel li kuŝadis kaj admiris la pejzaĝon, kaj ĝojis pri la varma somero. Ĉirkaŭe insektoj zumadis, kaj la suno agrable varmigis lian haŭton. Estis kviete kaj bone en la animo de la viro, kaj li jam sentis dormemon, kiam li subite ekaŭdis strangajn sonojn. Li retrorigardis - neniue estis, li leviĝis, sed tamen neniun vidis. Li kuŝiĝis sur la teron denove kaj aŭdis ion denove. La viro fiksaŭskultis, ĝis li komprenis, ke la sonoj venis ne de ie ajn, sed de sube, de sub la tero. Li alpremis sian oreilon al la varma herbo kaj senmoviĝis. Do, io frapas kaj batas tie en la profundo de la tero, sed ne nur frapas, sed ankaŭ ĝemas, kaj tiel peze, ke la koro disŝiriĝas je pecoj, kaj larmoj plenigas la okulojn. Ankaŭ la viro frapis la teron per sia pugno, kaj tiel forte, kiel li nur povis.

- Kiu vi estas kaj kiel vi trafis tien? - la viro kriis al la tero, sed la tero silentis kvazaŭ muta. - Kiu vi estas? - li ripetis.

- Mi estas la Nigra Bagnulo - aŭdiĝis el sub la tero. Dum mia tuta vivo mi laboras peze ĉi tie en mallibero, mi ne vidas la veran mondon, mi ne scias aŭ ne memoras, kiel aspektas tiu vera mondo. Mia haŭto nigriĝis, mia koro malmoliĝis, mia dorso fleksiĝis.

La viro kompatis la Nigran Bagnulon, kaj tiel kompatis, ke li ekploris, kaŝante siajn larmojn en la herbo.

- Ne ĉagrenu, Nigra Bagnulo - la viro kriis denove - Mi liberigos vin en la realan mondon, baldaŭ vi enspiros puran aeron, baldaŭ vi rektigos viajn ŝultrojn, baldaŭ vi varmiĝos sub la karesa suno. La viro impetis hejmen por preni fosilon, revenis kaj komencis fosi la

## sendis Petro Palivoda, el Ukrainio

kavon. La viro fosis dum unu tago, fosis dum la dua, falis sur la teron plurfoje senfortiĝinta, sed kiam li aŭdis pezan ĝemadon de la Nigra Bagnulo, li estis forgesinta tuj pri sia laciĝo kaj denove okupiĝis pri sia laboro. Ankaŭ la Nigra Bagnulo fosbatis la malmolan teron de sia flanko. Ili fordonis multajn fortojn al tiu laboro, multajn tagojn, kaj finfine ili penetris tra la tero unu al la alia. La viro kaptis nigran maldikan manon, kiu aperis el sub la tero kaj tiris ĝin al si. Li eltiris finfine la Nigran Bagnulon el lia infero. La viro ĝojis kvazaŭ etulo, purigis de la abomeninda tero la Nigran Bagnulon, donis akvon por li satrinku, donis panon por li satmanĝu. Ili sidiĝis proksime al la kavoj apud la arbo, la viro deziregis montri al la Nigra Bagnulo la veran mondon, kiun tiu eĉ ne memoris, deziregis rakonti, kio tie okazas.

- Ho, kia agrabla freŝa venteto - diris la viro al la Nigra Bagnulo - la vetero ŝanĝiĝas, baldaŭ pluvos iomete.

- Ĝi estas agrabla, sed ne tre, - respondis la Nigra Bagnulo ŝrumpante, - ĵus estis varme, nun estas jam malvarmete, tro rapide ĉio ŝanĝas ĉi tie ĉe vi sur la tero. Sed ĉe mi sub la tero la temperaturo estas ĉiam la sama, tie vi ne ŝvitos kaj ne frostiĝos, ne estas surprizoj por vi, ĉio estas simpla kaj komprenebla.

- Rigardu la ĉielon, kia beleco! - la viro montris la ĉielarkon, kiu aperis post la pluvo.

- Kia ajn beleco estu, sed mi ne tre volas rigardi la ĉielon, ĉio estas tiel hela kaj blindiga ĉi tie, ke mi miras, kiel homoj ankoraŭ ne perdis la vidkapablon pro ĉio ĉi. Miaj okuloj doloras pro via hela lumo. Sed ĉe mi sub la tero ĉio alias, ekzistas nenio por rigardi foren,



oni ne bezonas streĉi la vidkapablon. Mi havas mian laboron antaŭ mi, do mi rigardas ĝin.

Ankaŭ ĉi-foje la viro diris nenion, kaj poste li denove ripetis sian parolon:

- Rigardu, kiaj belaj floroj kreskas ĉirkaŭ vi, kliniĝu kaj flaru. Mi certas, ke vi ne flaris tiajn odorojn dum longa tempo.

- Ho ne, dankon, mi flaras eĉ sen kliniĝo, ĝi estas tro akra por mi. Sed ĉe mi sub la tero ne ekzistas tiaj akraj odoroj, la tero kaj ŝtono ĉiam odoras same, mi al kutimiĝis nur al ĉi tiuodoro.

Kaj la viro denove miris pri la vortoj de la Nigra Bagnulo, sed nur levis siajn ŝultrojn.

- Jen prenu ĉi tiujn novajn vestojn kaj alivestiĝu, kaj poste ni iros pli malproksimen kaj mi montros al vi ankoraŭ pli grandajn belaĵojn de ĉi tiu tero - la viro donis al li la vestojn.

La Nigra Bagnulo vestis sin, sed anstataŭ sekvi la viron, li denove sidiĝis apud la arbo.

- Kio okazis, - la viro demandis, - kial vi ne sekvas min?

- Viaj novaj vestoj estas tre malkomfortaj por mi, bonfarulo mia - la Nigra Bagnulo respondis sulkiginte la vizaĝon, - ili estas malvastaj kaj frotas mian haŭton. Tamen miaj ĉifonoj, kvankam ili estas malbelaj, estis malpezaj kaj malstrikaj, mi bone dormis kaj laboris en ili.

- Ne gravas, vi kutimiĝos al la novaj vestoj. Kaj al nia lando vi tute ne bezonas al kutimiĝi, ĝi estas

belega kaj favora por ĉiu homo. Vi havis grandan bonŝancon trovi bonan vojon sur la surfacon kaj vi ne plu estas la Nigra Bagnulo, ne, nun vi estas homo. Nur atendu - mi kuros kaj portos por vi bonajn ŝuojn, ni povos iri tre malproksimen kun vi por rigardi aliajn landojn, por ke vi vidu plene la belecon de la tero, ŝatu plene vian liberon.



La viro impetis hejmen por preni ŝuojn kaj revenis jam post momento, sed li jam ne trovis la Nigran Bagnulon apud la arbo. La viro ne komprenis, kien li estis malaperinta, do li iradis kun tiuj ŝuoj en la mano kaj vokis lin ĉien kaj kriis, sed la Nigra Bagnulo ne respondis. La viro ĉesis voki lin, nur kiam li revenis al la kavo, al tiu, el kiu li eltiris lin. Apud la freŝe fosita tero kuŝis la novaj vestoj de la Nigra Bagnulo.

verkis **Ĥristina Kozlovska**, el Ukrainio  
ilustraĵo de **Oleh Loburak**, el Ukrainio  
elukrainigis **Petro Palivoda**, el Ukrainio

## La Maraj Popoloj

**L**a enigmo de la 3.200 jaraĝa skribaĵo, kiu troviĝis en Afyonkarahisar en Turkujo jam solviĝis.

**La skribaĵo pruvis ke la “misteraj maraj popoloj”<sup>1</sup> estas el Anatolio aŭ Malgrandazio<sup>2</sup>**


Por la unua fojo oni deĉifris antikvan skribaĵon en Luvi lingvo, kiu troviĝis proksime al Afyonkarahisar urbo en la jaro 1878. Esploro farita per grupo de nederlandaj kaj svislandaj arkeologoj montris, ke la “misteraj maraj popoloj”, kiuj estas menciitaj en la antikvaj egiptaj dokumentoj kaj kiuj kontribuis al la fino de la Bronzepoko estas indiĝenaj popoloj de Anatolio.

Laŭ novaĵo de ĵurnalo ‘Independent’, arkeologoj sukcesis deĉifri antikvajn hieroglifojn trovitajn en skribaĵo sur ŝtono en Turkujo, kiu estis el antaŭ ol 3.200 jaroj. Esploristoj precizigas, ke la malkovro povos respondi al “unu el la plej grandaj enigmoj de la mediteranea arkeologio”.

Laŭ la novaĵo, en la jaro 1878, 29 metrojn longa friso el kalkŝtono, troviĝis en Beyköy vilago, 34 km for

## tradukis Vasil Kadifeli, el Turkujo

en la nordo de Afyonkarahisar urbo. La franca arkeologo George Perrot kopiis la skribaĵon, antaŭ ol la vilaĝanoj alportis tiun ŝtonon, por uzi ĝin kiel fundamento en nove konstruata moskejo,



### “La plej longa hieroglifo el la Bronzepoko”

Laŭ la novaĵo, kiun la rusa novaĵagentejo ‘Sputnik’ transdonis, la plej longa antikva skribaĵo restanta el la Bronzepoko estas en Luvi lingvo, kiun nuntempe povas legi nur kelkaj homoj.

Novaj malkovroj ekaperis dank’ al la laboro de nederlandaj kaj svislandaj grupo de arkeologoj. En tiu grupo troviĝas Dr. Fred Woudhuzien, kiu estas unu el la 20 homoj, kiuj povas legi Luvi skribon. Kaj la tradukaĵon de tiu antikva skribaĵo faris Wodhouzien.

### “Malkovriĝis la identeco de la misteraj maraj popoloj”



Anatolio, estas certe tiuj kiuj kontribuis al la okazaĵo nomita 'Invadoj de Maraj Popoloj' kaj al la fino de Bronzepoko. Tiel unu el la plej gravaj enigmoj de la mediteranea arkeologio eble estos solvita.

La tuto de la deĉifrita teksto kaj la esploro estos publikigota en la

Oni diras ke la teksto povos lumigi la fakton kiel la evoluigintaj kaj potencaj civilizacioj de la Bronzepoko forfalas. La teksto rakontas kiel la reĝejoj en Malgrandazio aŭ Anatolio unuiĝis kaj kreis floton por invadi la apudmarajn urbojn en la orienta Mediteraneo.

La esploristoj raportas, ke la skribaĵon pretigis Kupanta-Kurunta, la reĝo de Mira, en la jaro a.K. 1190 dum la malfruaj tempoj de la Bronzepoko. Laŭ la skribaĵo, la Anatoliaj civilizacioj, inkluzive de Mira, invadis antikvan Egiptujon kaj la aliajn partojn de la orienta Mediteraneo antaŭ ol la fino kaj dum la fino de la Bronzepoko.

Arkeologoj dum longa tempo sciis ke la senkontrola forfalo de la civilizacioj en la jaroj ĉirkaŭ a.K. 1200, okazis pro la efekto de sturmoj kiuj venis el la maro. La batalo de Trojo okazis dum la periodo ke la civilizacio de Miceno sturmis Anatolion, kvankam post la milito forfalas ankaŭ la micena civilizacio. En Anatolio post la Bronzepoko dum kelkaj jarcentoj regis ia "malluma epoko".

La nuntempaj arkeologoj nomas tiun mistera popolon kiel "Maraj Popoloj de Trojo" kaj estis dum longa tempo diskuto pri kiuj ili estis. La antikvaj skribaĵoj trovitaj en Egiptujo montras, ke tiuj popoloj ankaŭ invadis Kipron kaj Sirion.

### "Eble la plej granda enigmo de la Mediteranea arkeologio estos solvita"

La kopio de la skribaĵo troviĝis inter la posedaĵoj de James Melleart, historiisto pri antikvaj epokoj, post lia morto en 2012. La filo de Melleart donacis la kopion al Dr. Eberhard Zangger, la ĉefo de 'Fondaĵo pri Luvi Esploroj'.

La svislanda lingvisto kaj fakulo pri Luvi lingvo Dr Zangger taksis la rezultojn per la jenaj vortoj:

"Luvianoj, kiuj estis loĝantoj de la okcidenta

decembra numero de la scienca revuo 'Procedoj de la Nederlanda Arkeologia kaj Historia Socio'.

**1 Maraj popoloj** : La Maraj popoloj, aŭ Popoloj de la Maro, estis alianco de maristaj rabistoj (do piratoj) de la Egea kaj Tirena Maroj, kiuj navigis ĉirkaŭ la orienta Mediteraneo kaj invadis Malgrandazon, Sirion, Kanaanon, Kipron kaj Egiption fine de la bronzepoko. La Maraj Popoloj estas dokumentitaj fine de la deknaŭa dinastio de Egiptio kaj speciale dum la oka regoĵaro de Ramseso la 3-a de la dudeka dinastio de Egiptio kiam ili provis eniri kaj kontroli la teritorion de Egiptio. Inter la Maraj Popoloj identigitaj en la egiptaj registroj estas la ekveŝoj, grupo de bronzepokaj grekoj el Aĥeo; la tereŝoj, grupo de la Tirena Maro, antaŭuloj de la etruskoj; la likoj, anatolia etno de la Egea Maro kies nomo postvivis en la regnomo Likio; etno egipte nomita ŝerden, probable el Sardinio; etno egipte nomita ŝekeleŝ, italikoj el Sicilio; popolo egipte nomita peselet, probable la filiŝtoj eble venintaj tra la insulo Kreto kaj etno egipte nomita tekrur, rilata al la posta loĝantaro de Trojo - la lastaj du el la Maraj Popoloj kiuj poste firme setlis en Levantenio. (el Esperanto vikipedio).

**2 Anatolio aŭ Malgrandazio** : Terpeco, kiu etendiĝas el Azio al okcidento, ĉirkaŭata de la Nigra, Egea kaj Mediteranea maroj, la granda parto de Trkujo nuntempe.

Fonto: <http://t24.com.tr/haber/afyonda-bulunan-luvi-dilindeki-3-bin-200-yillik-yazitin-sirri-cozuldu,462148>



## La ansero kaj la porketo

sendis Dirce Sales, el Brazilo

**Z**uzu, la rozkolora porketo singultis malĝoje kun la vizaĝo apogita sur la aperturo de la alta balkono kie li vivis.

- Ho, ve! Kia malĝoja sorto la mia... Mi ŝatus gajni flugilojn por liberigi min de tiu prizono.

Neatendite, forta bruo de grandaj, viglaj flugiloj ektimigis la etan beston.

- Ne timu, Zuzu. Estas mi, Hans, la ansero gvardiano de la bestaj revoj.

- Ho, tutkoran dankon pro via vizito, mia bonkora gvardiano! Mi estis tiel malĝoja kaj angora ke eĉ sciante min tute sana, mi sentas doloron je la tuta korpo...

- Parolu pri via angoro, amiketo. Dialogo estas bona kaj efika medikamento kontraŭ la malsanoj de la animo.

- Mia ĉefa problemo temas pri la trudo de la homoj al mia vivo. Mi estas besto, kompreneble, kaj la naturo donis al mi la rimedojn necesajn por ke mi bone vivu.

- Tamen vi havas luksan vivon, Zuzu.

- Ja! Sed ĉu iu demandis min, ĉu mi tion bezonas? Ili trudas al mi siajn homkondiĉojn, homnecesojn, kvazaŭ mi perdus mian bestan rangon!

- Fakte, ekzistas personoj kiuj ne kapablas rekoni kaj akcepti la plej simplajn aspektojn de la vivo.

- Mi staras for de la grundo kaj de la steloj, enkarcerigita en tiu vera turo, tute sola... pro tio mi deziris flugilojn.

- Vidu, homoj volas ke vi estu homa kaj vi volas esti birdo?!

- Pardonon! Foje la soleco, la manko de niaj kunuloj por insterŝanĝi konfidencojn, timojn, karesojn, kaj aliajn aferojn, faras nin, momente, perdi la mensekvilibron.

- Vi ne bezonas peti pardonon, infano kara. Flugilojn vi ne povas gajni, tamen...

-... tamen kio, Hans?

- Mi povas konduki vin tra la senfina spaco, se vi ne timos.

- Sed kiel vi tion farus?

- Supreniru sur mian dorson – diris la ansero, malsuprenigante sian korpon. Kaj tuj, tuj la ĉielo gajnis strangan aferon: la granda, vigla ansero bele fluganta kun iu porketo gluita dorse.

Zuzu sentis sin tiel feliĉa, ke tute forgesis la angorojn de la koro. Vidis aliajn popolojn, aliajn kutimojn, vidis montarojn, riverojn, marojn, boskojn, arbarojn, bienojn, bestojn... multajn aferojn vidis Zuzu.

Preskaŭ je la komenco de la mateno, Hans redonis la porketon al ĝia loĝejo.

- Ĉu vi revenos, Hans?

- Jes! Kiam eble mi revenos.

- Sed kion mi povus fari por ne senti min ĝenata?

- Skribu historiojn, Zuzu. Ĝis la revido!

- Ĝis... Hans! Hans! Momenteton, pro bonvolo.


- Kio okazis? Diris la ansero revenante kaj eksidante sur la balkono.

- En kiu lingvo mi devos skribi la historiojn?

- Ho, bona demando! Skribu en Esperanto.

- Kial?

- Ĉar nur tiel ĉiu popolo povos ilin traduki al sia propra lingvo, ampleksante la konon kaj la plezuron legi.




## Nacia Fervojista Esperanto Konferenco

sendis Angel Maglov, el Bulgarujo



**B**ulgaraj fervojistoj esperantistoj estas plej aktiva sekcio ĉe Bulgara Esperanto Asocio. Ni

regule organizas diversajn aranĝojn en Bulgario. Tiu-ĉi jare ni partoprenis en laboro de kongreso de BEA dum aprilo en urbo Trojan. La kongreso de IFEF okazis en urbo Colmar - Francio. Niaj gesamideanoj partoprenis kaj poste rakontis al ni pri la kongreso. La 21-a kaj 22-a de oktobro en urbo Gorna Orjahovica - granda fervojnodo en norda Bulgario - okazis nacia fervojista Esperanto konferenco. Partoprenis 33 gesamideanoj



el Bulgario. Kara nia gasto estis s-ro Nebojša Stankoviĉ el urbo Niš - Serbio. Kiel normale la prezidantino s-ino Petja Aleksandrova raportis por unujara laboro de sekcio. Ŝi substrekis, ke niaj samideanoj estas aktivaj, tamen ni ne organizas kurson, ĉar mankas dezirantoj. Je la nomo de BEA s-ino Veselka Kamburova salutis la konferencon. Ŝi

diris, ke fervojistoj ĉiam estas la motoro de Asocio. Mi prelegis pri atrakciaj veturadoj per trajnoj trenitaj de vaporlokomotivoj en Bulgario kaj eksterlande. La intereso estis granda. Vespere ni amuziĝis en belega restoracio. La kantoj, bonhumoro kaj amika etoso daŭris dum la tuta tempo.

## “La ventro de Parizo” de Emile Zola

sendis Gioia Albano, el Italujo

(La arto pentri la tutan kolorgamon sen uzi iun pigmenton)

**Ĉ**iam mi pensis, ke inter la malsimilaj artaj esprimoj de la homaro, la verkado estas la malriĉa arto antonomazie, ĉar por manifestiĝi, ĝi bezonas nur paperon kaj inkon.



Ĝi havas nenion komunan, ekzemple, kun la kosta kaj la varia ekipaĵo necesanta al pentristo, kiu - se volas krei sendubmaniere - devas sin ĉirkaŭi per multegaj objektoj: per temperoj anstataŭ koloroj el oleo; per kretoj anstataŭ karbobastonetoj; per sangvinoj anstataŭ akvareloj.

Kaj tamen mi neniam kredis, ke ankaŭ la verkisto – kiam li estas sufiĉe kapabla – povas pentri la objektojn atingante la saman verŝajnecon de tiu kiu disponas pri granda variececo de teknikoj per tiuj stampi, plezure, sur la neŭtra surfaco la spuron de la nuancoj aŭ de “la lumo-mallumo”.

Tamen, per “La ventro de Parizo” malfermita kaj reversita kontraŭ mia vizaĝo, mi konstatas ekzakte la jenon: kvankam sen eliri de la mallarĝa ĉirkaŭbaro de la dudek ses literoj de la alfabeto, la verkisto povas obteni la saman elvokivan povon de la koloroj kaj de iliaj multnombraj nuancoj, kiel tiu kiu uzas krajonojn, penikojn, tolojn kaj tubetojn.

La libro apogita sur la okuloj, kovras min kvazaŭ per providenca tendo kiu deprenas min, momente, de la kombinaĵo ruĝobrila de la vortoj sur la senmovaj linioj de ĉiu paĝo.

Parizo estas eternigata tie, dum maĉas kaj englutas; do, poste, ĝi digestas kaj elpelas ĉian nutraĵon disrompitan. Sed ankaŭ la uloj ne evitas la haketadon de tiuj arkoj dentaraj nevideblaj.

El ili Florent, la protagonisto de la romano, iĝos la gluto diserigenda malpli fibra ol tiuj kiuj estos interpretataj inter la makzelo kaj la mandiblo de la “malsata” kreitaĵo, - kreitaĵo ennestiganta sur la labretoj de la vendotabloj kaj sur la tabloj de la butikoj, kie pozas ĉia gastronomia specialaĵo.

La abunda ventro kolektiva grasigas tagon post tago, elirante ekster la kvartalo pariza de la bazaroj, ekster la stratetoj de la urbo, ekster la ĉambroj de la hejmoj kiuj traŝvitas kulinarajn ŝimodorojn.

La mallumo dum iom da tempo deigas min el ŝanĝa flagrado de la koloroj kiuj ekbrilas senĉese super ĉia nutraĵo. Kiom estas la tonoj de ruĝa kiuj amasiĝis ĉe la surfaco de la paĝoj kvazaŭ ili volas eliri? Sincere mi ne scias plu tion, ĉar mi perdiĝas inter la reflektaj amarantaj, grenataj, purpuraj, karmezinaj devenantaj jen de peco da bovaĵo jen de koliero da kolbasoj.

Mi eĉ ne sukcesas paroli pri mia konfuziĝo antaŭ la verdaj (jen plej mallumaj, jen plej lumaj) kies legomoj elrandiĝas, per la alternado de satireco, kiu igas ilin jen plej malbrilaj, jen plej brilaj.


Kaj la flavaj dissemitaj sur la fruktoj, sur la fromaĝoj, sur la skvamoj de la fiŝoj estas tiel multnombraj, ke la forto de ilia puŝo disŝiras la nigran ekranon kiun proponas mia “poŝformata” tolo.

La koloroj tinkturas per gajaj koloraj kontrastoj la vokalojn kaj la konsonantojn desegnitajn per la inko nigra de la preso.

La nigra sorbas, tial ĝenerale kuŝas, sed - kiel ĉitufuĝe - ĝi povas ankaŭ malkovri pli ol kiom devus kovri. Briletado blueto, trembrilado el kupro, flagrado el arĝento enrompas de la rondigitaj randoj de la literoj; kaj de tie komencas la vojaĝo en abundeco de la nuancoj pli brilaj; aŭ de la ombroj iom post iom plej markitaj.

Nun mi haltas ĉe la priskribo de la floroj. Ĝi donacas al mi la ĉielarkon ĉar, sur la petaloj, neniam estas privilegia ondolongo.

Post la fino de la legado, mi memoras abrupte, ke la blanka entenas ĉiujn kolorojn. Tiam mi pensas, ke neniu portalo estus transportinta min pli bone ol simpla



papero, kie efektive mi estis: tio estas, al la regno de la imago, kie la tuta kolora spektro estas videbla nudokule, kvankam efektive la koloroj ne estas.

Fonto: <http://eccoilmiblog.wordpress.com/2011/05/03/il-ventre-di-parigi-di-emile-zola/>

## Parabolo pri vivo post naskiĝo

**D**u beboj (kredanta kaj nekredanta) parolas en la ventro de graveda virino.

**Nekredanta:** Ĉu vi kredas je la vivo post naskiĝo?

**Kredanta:** Kompreneble mi kredas. Evidente, ekzistas vivo post naskiĝo. La celo de nia restado ĉi tie devas fortiĝi por sin prepari por vivo.

**N:** Stultaĵoj! Ne eblas vivi post naskiĝo. Ĉu vi povas imagi, kia vivo estus tio?

**K:** Nu, mi ne scias la detalojn, sed mi kredas, ke estos pli da umoj kaj ni povos marŝi per niaj piedoj kaj manĝi per niaj buŝoj.

**N:** Ne eblas marŝi per viaj propraj piedoj kaj manĝi per via propra buŝo! Tio estas ridinda! Ni havas umbilikan ŝnuron, kiu nutras nin. Jen kion mi diros al vi: ne povas esti vivo post naskiĝo, ĉar nia vera vivo - la umbilika ŝnuro - estas tro mallonga.

**K:** Ankoraŭ, mi certas, ke la vivo post naskiĝo estas sufiĉe ebla. Simple ĉio estos iom malsama. Imagu nur.

**N:** Sed neniu revenis de tie! Vivo finas post naskiĝo! Alivorte, la vivo estas nur sufero en la mallumo.

**K:** Ho, ne! Mi ne scias, kia nia vivo estos post la naskiĝo, sed ni certe renkontos Panjon kaj ŝi prizorgos nin.

## sendis Keti Foteva, el Bulgarujo

**N:** Panjon? Do vi kredas je la ekzisto de Panjo? Kaj kie vi pensas, ke ŝi estas?

**K:** Estas ĉie ĉirkaŭ ni, ni loĝas en ŝi, ni povas moviĝi kaj vivi tra ŝi; sen ŝi ni ne povus ekzisti.

**N:** Stultaĵoj! Mi neniam vidis iun Mama - do, estas pli ol certe, ke ŝi ne ekzistas.

**K:** Ne, mi ne povas konsenti kun vi. Kelkfoje kiam ĉio ĉirkaŭ ni malaperas, mi aŭdas ŝin kanti kaj mi sentas, kiel ŝi karesas nian mondon. Mi konvinkiĝis, ke nia vera vivo komenciĝos post naskiĝo, kaj vi?



tradukis kaj sendis **Keti Foteva**, el Bulgarujo


## Poemoj

### Sur la pint' de poezi'

Mi ebrigas... Esperanto lulas.  
Buŝ' mia, kiel iu fabela font',  
Salivon ravan naskas. Kaj ĝi fluas...  
Ne por la samtempulo, por estont' .

Kaj aĉa kaĉo el la vortoj densas.  
Radikoj miaj dronas en ĥaos'  
De bakanal' sen rimo, ritmo, senco,  
Pikante per monstreco ĝis la ost' .

Memoro mia feblas, sed ja eblas  
Eĉ nun reveni al tiu ĉi vizi' :  
Mi, kiel brut' , senmovas kaj plenmeblas,  
Sed ĝojas sur la pint' de poezi' ...




**Evgenij Georgiev**,  
el Kazaĥio

### Mi estas grizhara

Mi jam grizhara estas,  
sed mi vivas sekura  
kun la rigard' serena  
kaj kun la koro juna.

La viv' ankoraŭ belas,  
ĉar kun la menso pura  
mi agas kun junuloj  
kaj kun la plej maturaj.

Mi jam grizhara estas,  
kvakam la suno sunas,  
sur la maljunaj homoj  
nur luna lumo lumas.



**Angel Arquillos**,  
el Hispanujo

**L**a “Ruĝa Morto” ekde longa tempo ruinigis la landon. Neniu pesto iam estis tiom fatala, aŭ tiom abomeninda. Sango estis ĝia avatara <sup>1</sup> kaj ĝia sigelo—la ruĝeco kaj la hororo de sango. Estis akraj doloroj, kaj subita kapturigo, kaj tiam abunda sangado el la poroj kun disovlo. La sangoruĝaj makuloj sur la korpo kaj ĉefe sur la vizaĝo de la viktimo, estis la kaŭzoj, kiuj tenis lin for de la helpo kaj simpatioj de siaj kunuloj. Kaj la tuto de atako, progreso kaj finiĝo de la malsano, estis okazoj de nur duonhoro.

Sed la Princo Prospero <sup>2</sup> estis feliĉa kaj maltima kaj sagaca. Kiam lia teritorio restis duone senhoma, li kunvokis al sia ĉeesto mil sanajn, gajajn kaj facilanimajn geamikojn el inter la kavaliroj kaj nobelinoj de sia kortego, kaj kun ili, li retiriĝis en la profunda izoleco de unu el siaj krenel-havaj abatejoj <sup>3</sup>. Tiu estis ampleksa kaj belega strukturo, la kreaĵo de la propra stranga tamen bonega gusto de la Princo. Ĝin ĉirkaŭis forta kaj altega muro. Ĉi tiu muro havis pordegojn el fero. La korteganoj, post ilia eniro, alportis fornojn kaj pezajn martelojn kaj kunforĝis la ŝraŭbojn.

Ili decidis ne forlasi rimedojn por eniro aŭ eliro pro la subita impulso de senespero el ekstere, aŭ de frenezeco el interne. La abatejo estis abunde provizita kun necesajoj. Kun tiaj antaŭrimedoj la korteganoj povus kontraŭstari al infektado. La ekstera mondo povus flegi sin mem. Dume, malĝojoj aŭ pensi estis malsaĝe. La princo jam provizis por ili ĉiujn instrumentojn por plezuro. Estis klaŭnoj, estis improvizistoj <sup>4</sup>, estis baletistoj, estis muzikistoj, estis belo, estis vino. Ĉiuj ĉi tiuj kaj sekureco estis en la interno. Ekstere estis la “Ruĝa Morto.”

Estis preskaŭ je la fino de la kvina aŭ sesa monato de lia izoleco, kiam dum la pesto senbride furiozegis eksterlande, Princo Prospero amuzis sian mil geamikojn en maskobalo de neordinarega grandiozeco.

Estis volupta sceno, tiu maskerado. Sed, unue permesu min informi pri la ĉambroj en kiuj ĝi estis organizita. Ili estis sep — imperia aro da ĉambroj. En multaj lokoj, tiaj ĉambroj formas longan kaj rektan perspektivon, dum la faldeblaj pordoj ŝoviĝas reen preskaŭ ĝis la muroj ambaŭflanke, tiel ke la tuta amplekso de la vido estas apenaŭ barita. Tamen tie ĉi la afero estis tre malsama; kiel oni povus antaŭvidi, pro la stranga amo al malkutimo, kiun posedis la duko <sup>2</sup>. La apartamentoj estis tiel hazarde utiligitaj, ke la vido brakumis ilin po nur unu aŭ du en unu fojo. Estis akra turnigo je ĉiu dudek aŭ tridek jardoj <sup>5</sup>, kaj

je ĉiu turnigo estis originala efekto. En la dekstra kaj maldekstra, meze de ĉiu muro, alta kaj mallarĝa gotika fenestro rigardis desupre al fermita koridoro, kiu strebis sekvi la kurbiĝojn de la ĉambraro. Ĉi tiuj fenestroj estis de prilaborita vitro <sup>6</sup>, kies koloroj variis konforme kun la kolornuanco, kiu regis la dekoraciojn de la ĉambroj en kiuj ili malfermiĝis. Tiu, kiu pendis en la ekstrema orienta flanko, ekzemple, estis blua — kaj viglaj bluaj estis ĝiaj fenestroj. La dua ĉambro havis purpurajn dekoraciojn kaj tapetojn, kaj ĉi tie la vitroj estis purpuraj. Entute la tria estis verda, kaj tiel estis ĝiaj fenestroj. La kvara estis meblita kaj lumigita kun oranĝkoloro — la kvina kun blanka koloro — la sesa kun violkoloro. La sepa apartamento estis intime vualita kun nigraj veluraj tapetoj, kiuj pendis el la tuta plafono kaj malsupren la muroj, kaj falis kun pezaj faldoj sur tapiŝon de la sama materialo kaj kolornuanco. Sed nur en ĉi tiu ĉambro, la koloroj de la fenestroj malsukcesis akordi kun la dekoracioj <sup>7</sup>. La vitroj ĉi tie estis skarlataj—profunda koloro de sango. Krome, en neniu de la ses apartamentoj estis ajna lampo aŭ kandelabro inter la troo de oraj dekoracioj kiuj kuŝis dissemiataj tien kaj reen aŭ pendis de la tegmento. Ne estis lumo de ajna speco eliĝinta de lampo aŭ kandelo interne de la ĉambraro. Sed en la koridoroj kiu sekvis la ĉambraron, tie staris, kontraŭ ĉiu fenestro, peza tripiedo, entenante fajrujon, kiu projekciis siajn radiojn tra la vitro kaj do tre brile prilumis la ĉambron. Kaj tiel, amaso da buntaj kaj mirindaj ŝajnaĵoj produktiĝis. Sed en la okcidenta, aŭ nigra, ĉambro la efekto de la fajra lumo, kiu radiis sur la malhelaj ornamaĵoj tra la sangokoloraj vitroj, estis treege timiga, kaj produktis tiel sovaĝan aspekton sur la vizaĝesprimoj de tiuj kiu eniris, ke estis malmultaj el la kompanio, kiuj havus sufiĉan kuraĝon meti la piedojn interne de ĝiaj limoj. Estis en tiu ĉi apartamento, ankaŭ, giganta holoĝo el ebono, kiu staris ĉe la okcidenta muro; ĝia pendulo balancis tien kaj reen kun obtuza, peza, unutona knarado. Kaj kiam la minutmontrilo faris rondiron sur la horloĝvizaĝo, kaj la horo estis batota, elaŭdiĝis sonorado, el la aŭdacaj kaj bronza pulmoj de la horloĝo, sono kiu estis klara kaj laŭta kaj eksterordinare muzika, sed de tiom nekutima noto kaj emfazo, ke je ĉiu paso de horo, la muzikistoj de la orkestro senvole paŭzis dum kelka tempo sian koncerton por aŭskulti al la sono. Tiel, la valsantoj devige haltigis siajn turnigojn; kaj okazis mallonga maltrankviliĝo en la tuta feliĉa kompanio. Kaj dum la sonorado ankoraŭ daŭris, oni observis ke eĉ la





plej grandaj frivoluloj paliĝis, kaj la plej aĝaj maljunuloj kaj sobraj frotis per siaj manoj siajn fruntojn kvazaŭ ili estis revantaj kun konfuzo aŭ ili estis meditantaj. Sed kiam la eĥoj komplete haltis, mallaŭta ridado tuj trapenetris la kunvenon. La muzikistoj rigardis unu al la alia kaj ridetis kvazaŭ por siaj propraj maltrankvileco kaj malsaĝeco, kaj flustre ĵuris unu al la alia, ke la posta sonorado de la horloĝo ne kaŭzus al ili similan emocion. Kaj tiam, post kiam sesdek minutoj pasis, (kiuj enhavas tri mil kaj sescent sekundojn de la Tempo kiu flugas,) venis alia sonorado de la horloĝo, kaj tiam estis la sama antaŭa maltrankviliĝo kaj meditado. Sed, malgraŭ ĉi tiuj aferoj, estis feliĉa kaj belega festego. La gustoj de la duko estis strangaj. Li havis fajnman okulon por koloroj kaj efektoj. Li malatentis la dekoracion de malaltranga modo. Liaj planoj estis aŭdacaj kaj fervoraj, kaj liaj perceptoj ardis kun barbara brilo. Estas homoj, kiuj kredus, ke li estis freneza. Tamen liaj sekvantoj sentis la malon. Oni devis aŭdi kaj tuŝi lin por certiĝi, ke li ne estis freneza.

Li direktis, plejparte, la moveblajn ornamaĵojn de la sep ĉambroj, por la okazo de ĉi tiu granda festo; kaj estis liaj gvidaj gustoj, kiuj donis karakterojn al la maskovestantoj. Estu certa, ke ili estis groteskaj. Estis multe da brilegoj kaj briletadoj kaj ekscitaĵoj kaj fantazioj — la plejmulto jam vidita ekde “Hernani”<sup>8</sup>. Estis arabeskaj figuroj kun maltaŭgaj membroj kaj celoj de mebloj. Estis deliraj luksaĵoj kiel modo de frenzulo. Estis multe da beleco, multe da diboĉo, multe da strangeco, iom da teruro, kaj ne malmulte da tio, kio eblis eksciti naŭzon. Tien kaj reen, en la sep ĉambroj gbatis, efektive, amaso da revoj. Kaj tiuj ĉi — la revoj — tordiĝis serpentume tien kaj reen, prenante kolornuancon el la ĉambroj, kaj kaŭzis, ke la sovaĝa muziko de la orkestro ŝajnis kiel la eĥo de iliaj paŝoj. Kaj jen, baldaŭ batas la horon la horloĝo el ebono, kiu staras en la halo el veluro. Kaj tiam, momente, ĉio senmoviĝas, kaj ĉio silentiĝas krom la voĉo de la horloĝo. La revoj rigide frostiĝas dum ili staras. Sed la eĥoj de la sonorado formortas — tiuj daŭras nur momento — kaj ia malpeza, duone subigita rido flosas malantaŭ ili dum ili foriras. Kaj nun denove la muziko ŝvelas, kaj la revoj vivas, kaj tordiĝas tien kaj reen pli

feliĉe ol iam ajn, prenante kolornuancon el la multkoloraj fenestroj tra kiuj radias la lumo el la tripedoj. Sed en la ĉambro, kiu estas la plej okcidenta de la sep, estas nun neniu de la maskituloj, kiuj aventuras. La nokto forpasas; kaj nun fluas plej ruĝa lumo tra la sango-koloraj vitraĵoj. Kaj la nigreco de la zibela drapiraĵo teruras; kaj por tiuj, kies piedo falas sur la zibelan tapiŝon, jen venas el la proksima ebena horloĝo obtuza knarado pli solene emfaza ol io ajn, kiu atingas iliajn orelojn, kiu indulgas en la plej malproksimaj gajecoj de la aliaj apartamentoj..

Sed ĉi tiuj aliaj apartamentoj estis dense homplenaj, kaj en ili febre batadis la koro de vivo. Kaj la festego daŭris en kapturiga maniero, ĝis finfine komenciĝis la sonorado de noktomezo sur la horloĝo. Kaj tiam la muziko ĉesis, kiel mi jam diris. Kaj la turniĝoj de la valsantoj estis silentigitaj; kaj estis maltrankvila ĉesado de ĉio kiel antaŭe. Sed nun estis dudek batoj sonorotaj per la horloĝo; kaj tiel okazis, eble, ke pli da penso rampis, kun pli da tempo, en la meditadojn de la pensemaj inter tiuj, kiuj festegis. Kaj tiel, ankaŭ, okazis, eble, ke antaŭ ol la lastaj eĥoj de la lasta sonorado tute dronis en silento, estis multaj individuoj en la amaso, kiuj trovis libertempon konscii la ĉeeston de maskita figuro, kiu ne kaptis la atenton de eĉ unu sola individuo antaŭe. Kaj la klaĉo pri tiu ĉi nova ĉeestanto, disvastigante sin flustre ĉirkaŭen, levis el la tuta grupo zumon aŭ murmuron, esprimplenan je malaprobo kaj surprizo — tiam, finfine, de teruro, de hororo, kaj de naŭzo.

En amasiĝo de fantaziaĵoj kiel mi jam pentris, eble estus bone supozi, ke neniu ordinara apero povus ekestigi tian sensacion. Vere la maskerado-libereco de la nokto estis preskaŭ senlima; sed la koncerna figuro estis pli heroda ol Herodo<sup>9</sup>, kaj iris preter la limoj de eĉ la sendifina deco de la princo. Estas kordoj en la koroj de la plej sentimaj homoj, kiujn oni ne povas tuŝi sen emocio. Eĉ por la tute perdintoj, por kiuj vivo kaj morto egale estas ŝercoj, estas aferoj, pri kiuj oni ne povas fari ŝercojn. La tuta grupo, fakte, ŝajnis nun profunde senti, ke en la kostumo kaj maniero de la nekonato ekzistis nek saĝo nek taŭgo. La figuro estis alta kaj maldika, kaj vualita de kapo ĝis piedo en la



vestaĵoj de la tombo. La masko kiu kaŝis la vizaĝon estis farita por preskaŭ simili al la vizaĝesprimo de rigidiĝinta kadavro kaj la plej bona ekzameno havus malfacilaĵon ekvidi la trompon. Kaj tamen ĉio ĉi povus esti eltenita, se ne aprobita, de la frenezaj festantoj ĉirkaŭe, la kostum-portanto estis tiel aŭdaca, ke li alprenis la aspekton de la Ruĝa Morto. Liaj vestaĵoj estis makulitaj kun sango, kaj lia larĝa frunto, kun ĉiuj trajtoj de la vizaĝo, estis aspergita per la skarлата hororo..

Kiam la okuloj de Princo Prospero falis sur tiu ĉi fantoman figuron (kiu kun malrapida kaj solena moviĝo, kvazaŭ por plej komplete daŭrigi sian rolon, gvatis tien kaj reen inter la valsantoj) li estis vidita konvulsii, en la unua momento kun forta ekstremo aŭ de teruro aŭ de malŝato; sed, en la posta, lia frunto ruĝiĝis kun kolerego.

“Kiu aŭdacas?” li postulis raŭke al la korteganoj kiuj staris proksime al li — “kiu aŭdacas insulti nin kun tiu ĉi blasfema mokaĵo? Ekkaptu lin kaj senmaskigu lin — por ke ni povu scii, kiun ni devas pendumi je sunleviĝo, el la remparoj!”

Estis en la orienta aŭ blua ĉambro en kiu staris Princo Prospero dum li elparolis tiujn ĉi vortojn. Ili sonis ĉie tra la tuto de la sep ĉambroj laŭtvoĉe kaj klare — pro tio, ke la princo estis kuraĝa kaj fortika viro, kaj la muziko silentiĝis je lia mansigno.

Estis en la blua ĉambro kie staris la princo, kun grupo de palvizaĝaj korteganoj apud li. Unue, kiam li parolis, okazis ioma rapida moviĝo de tiu ĉi grupo en la direkto de la enrudulo, kiu en tiu momento estis ankaŭ proksime por kapti lin, kaj nun, kun intenco kaj majesta paŝo, li alproksimiĝis al la parolanto. Sed pro ia certa sennoma timego, per kiu la frenezaj supozoj de la kostum-portanto inspiris la tutan festo-grupon, estis neniu kiu etendis la manon por kapti lin; tiel ke li libere alvenis proksime je unu jardo de la princa korpo. Kaj dum la granda amaso, kvazaŭ per unu impulso, retropaŝis de la ĉambro-centroj al la muroj, li, la impona figuro, trovis sian vojon seninterrompe, sed kun la sama solena kaj singardema paŝo, kiu distingis lin ekde li aperis, tra la blua ĉambro al la purpura — tra la purpura al la verda — tra la verda al la oranĝkolora — tra ĉi tiu denove al la blanka — kaj eĉ de tie al la violkolora, antaŭ ol decida movo estis farita por ekkapti lin. Estis tiam, tamen, ke la Princo Prospero ekfrenezigiĝante kun kolerego kaj la honto de sia momenta malkuraĝeco, haste kuregis tra la ses ĉambroj, dum neniu sekvis lin pro la teruro, kiu ekposedis ĉiujn. Li tenis supre elingigitan ponardon, kaj alproksimiĝis, en rapida impeto, ene de tri aŭ kvar futojn <sup>5</sup> al la figuro kiu retiriĝis, kiam ĉi lasta, atinginte la ekstremaĵon de la velura apartamento, turnis sin

subite kaj alfrontis sian persekutanton. Estis akra krio — kaj la ponardo subite falis sur la zibelan tapiŝon, sur kiu, tuj sekve, la Princo Prospero sursterniĝis ventre kaj mortis. Tiam, alvokate de la sovaĝa kuraĝo de malespero, amaso de la festantoj senprokraste ĵetis sin en la nigran apartamenton, kaj ekkaptante la kostum-portanton, kies alta figuro staris rekte kaj senmove en la ombro de la ebena horloĝo, laŭte enspiris kun senvorta hororo, kiam ili trovis nur striojn de vaksita mortotuko kaj la kadavro-ŝajnan maskon sen iu ajn alian tuŝeblan formon, kaj tiujn ili pritraktis kun tre perforta malrespekto.

Kaj nun estis agnoskita la ĉeesto de la Ruĝa Morto. Li venis kiel ŝtelisto en la nokto. Kaj unu post la alia faligis la festantojn en la sangokovritajn halojn de ilia festado, kaj ĉiu mortis en la senespera pozicio de sia falo. Kaj la vivo de la ebena horloĝo formortis kun tiu de la lasta gajulo. Kaj la flamoj de la tripedoj estingiĝis. Kaj la Mallumo kaj Putriĝo kaj la Ruĝa Morto nelimigeble superregis ĉiujn.

rakonto de **Edgar Allan Poe** tradukis **Rebecca Dufresne**, por la festo de Halloween en la fino de oktobro redaktis **Vasil Kadifeli**

-----  
\* Karaj legantoj Edgar Allan Poe estas grava verkisto de timigaj rakontoj. Ni esperas, ke vi ŝatos ĉi tiun rakonton, kaj esperas ke ni sukcesis konservi ĝian unikan specon de teroro dum la tradukado. Bonvolu ĝui ĝin.

**1 Avataro** : En ĉi tiu rakonto Poe uzas tiun vorton kiel la marko de la pesto en la vortara aŭ literatura signifo de “malsupreniĝo de diulo sur la teron en enkarniĝinta formo”.


**2 Princo Prospero la dukto** : “Duko” estas la titolo de la frato, aŭ filo, de reĝo, aŭ la kronprinco.

**3 Abatejo** : Vivejo de la plej malnovaj monaĥaj ordenoj; en tiuj malnovaj tempoj anltrangaj nobluloj ankaŭ estis gvidantoj de la eklezio, pro tio iliaj kasteloj estis ankaŭ religiaj konstruaĵoj.

**4 Improvizistoj** : Aro de italaj poetoj kiuj improvizis aŭ kreis tuj siajn poemojn surscene. Ili ekaperis en la 14-a jarcento (trecento en la itala) kaj la tia tendenco en arto malaperis ĉirkaŭ la jaro 1840.

**5 Jardo, /futo**: Britaj mezurunuoj de longo (0,917 m kaj 0,292 m respektive).

**6 Vitralo**: Kunaĵo el diverskoloraj pecoj de vitro, kunigitaj per



plumbostrioj por formi desegnojn; vitro-mozaika fenestro.

**7 Kolorigita vitralo kaj la signifo de koloroj:** Iam la vitrofaristoj uzis diversajn metalojn por miksi kaj do tinkturi la vitron dum la vitrofarado procezo. En la okcidenta ĉambro, kiu estis kolorigite nigra, la vitroj ne estis nigraj ĉar ne ekzistis tekniko por fari tion. Tiu arto, kiun oni uzis inter la 13-a ĝis la 19-a jarcentoj poste perdiĝis, kaj ni ne multe scias kiel ili faris la diversajn kolornuancojn, plue kelkaj el la ingrediencoj iam uzitaj, nun oni scias, ke ili estas danĝeraj kaj eĉ mortigaj. Jen angla retejo pri la tekniko: <http://www.madehow.com/Volume-2/Stained-Glass.html>

En la rakonto, Poe uzas kolorojn kaj ĝiajn ordon kiel simboloj, ekzemple:

- **La blua ĉambro:** La blua koloro normale simbolas naskiĝon
- **La purpura:** Ĝi estas kombinaĵo de blua (naskiĝo) kaj ruĝa (vivo kaj intenseco) kaj ĝi simbolas la komencon de kreskado.
- **La verda:** Tiu koloro simbolas printempon de vivo, do ĝi simbolas junecon.
- **La oranĝkolora:** Ĝi simbolas la someron kaj aŭtunon de vivo.
- **La blanka:** Tiu koloro sugestas aĝon (ekz. blanka hararo)
- **La violkolora:** Ĝi estas kombinaĵo de purpura kaj blua koloroj aŭ de purpura kaj griza koloroj. Ĝi estas ombra koloro kiu simbolas malhelecon kaj morton.
- **La nigra:** Evidente ĝi simbolas morton. Poe ne mencias

iun ruĝan ĉambro. Li konservis tiun koloron en sia rakonto ĉefe por sango, timo kaj morto. Li priskribas la nigran ĉambro kiel: "La vitroj de ĉi tiu ĉambro estis skarlatataj... la efekto de la fajra lumo, kiu radiis sur la malhelaj ornamaĵoj tra la sangokoloraj vitroj, estis treege timiga...."

Fontoj:

<http://www.shmoop.com/masque-of-red-death/seven-colored-rooms-symbol.html>

<http://www.crivoice.org/symbols/colorsmeaning.html>

**8 Hernani** estas teatraĵo de Victor Hugo ([https://eo.wikipedia.org/wiki/Hernani\\_\(Victor\\_Hugo\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Hernani_(Victor_Hugo))) publikigita en la jaro 1830. Poe referencas al tiu teatraĵo en sia rakonto kiun publikigis en la jaro 1842. Poste, Giuseppe Verdi en la jaro 1844 komponis la operon "Ernani" bazita sur tiu teatraĵo.

**9** Ĉi tie per la nomo **Herodo**, Poe montras la kruelecon de la nove aperanta tute nekonata figuro de la maskobalo. Herodo estas la nomo de pluraj hebreaj reĝoj, i.a. Herodo la Granda (40 - 4 a.K.), reĝo de la judoj, kiu laŭ la evangelioj ordonis la amasbuĉon de infanoj en Bet-Leĥemo.



## Ŝercoj



Edzino:

— Karulo, ĉu vi rememoras pri tiu tago, kiam vi petis mian manon kaj mi akceptis tion? Mi estis tre kortuŝita. Mi ne

povis ekparoli unu horon.

Edzo:

— Jes, mi rememoras. Ĝi estis la plej feliĉa horo de mia vivo.

\*\*\*

Virino plendas al policisto:

— Antaŭ tri tagoj mia edzo iris al la vendejo por aĉeti terpomon, ĉar mi deziris fari nudelon. Depost tio li ne venis hejmen. Sinjoro kapitano, diru, kion mi faru? — Sinjorino, faru alian manĝaĵon!

\*\*\*

Policisto telefonas al sia ĉefo:

— Ĉefo, mi jam estas surloke. Maljuna virino mortbatis sian edzon, ĉar li surpaŝis ĵus purigitan plankon. — Ĉu vi arestis la virinon? — Ne, ĉar la planko ankoraŭ ne sekiĝis.

\*\*\*

Viro kaj lia edzino promenas en la urbo. Ili eniras ĉiun preĝejon. Neatendite ili renkontas la amikon de la viro. — Ĉu vi serĉas ion? — demandas la amiko. — Jes ni ricevis du bileton por la opera prezentado La geedziĝo de Figaro, sed ni ne scias, en kiu preĝejo ĝi estos?



«Unutage ĉiun semajnon, mi permesas al mi manĝi ion, kion mi volas. Dum la resto de la semajno, mi ankoraŭ manĝas ion, kion mi volas, sed tio ne estas permesata.»

## Krucvorteniĝmo



### Horizontale

1. Alparola termino kaj titolo de ĝentileco, uzata en la laboristaj organizaĵoj; Ekstera monstro de ies forto aŭ kapablo.

2. Usona prezidanto; (inverse) malgranda maro.
3. Scienco pri la formoj kaj leĝoj de la pensado; (inverse) Kolekto de objektoj de nia percepto aŭ pensado, konsiderata kiel finita tuto.
4. Estaj<sup>o</sup> de idnaska sekso; Parto de urbo, orname provizita per grandaj gazonoj, arboj izolitaj aŭ grupigitaj, lagetoj k florejoj, por la distro de la publiko.
5. Ĉefurbo de Kroatio; (inverse) lo diferenca per unu aŭ pluraj ecoj.
6. Ago de io kiu kovras per nenormala superfluo da akvo; Sistema de hiperteksto en Interreto sen teksaĵo; (inverse) Sufikso almetiĝanta al numeraloj kaj uzata por derivi vortojn, indikantajn unu el la egalaj partoj de tuto.
7. La nedifinebla, nepersona princip', imanenta en la universo kaj ĝin movanta, karakterizata de la alterno de jino kaj jango; (inverse) Kunaĵo el du samspecaj vivuloj.
8. Dekoracia tolo funde de la scenejo; La plej konata strando kaj allogaĵo de Rio-de-Janeiro.
9. Rusa nomo por virinoj; (inverse) senvokala tago.
10. Familia nomo de du francaj imperiestroj; (inverse) prepozicio montranta la materialon, kiu konsistigas ion.

### Vertikale

1. Fortega kunpuŝiĝ' de du moviĝantaj objektoj; Alia nomo de vici'.
2. Tiu kiu ricevas, laŭ kontrakto kaj post pago, dum difinita tempo, gazeton, komercaĵon, fervojbileton, telefonservon ktp.
3. Ĉe la medoj kaj persoj, pastr' de la Zoroastra

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1									■			
2						■						
3							■		■			
4			■	■	■		■					■
5								■				
6							■			■		
7	■			■		■					■	
8					■							
9		■						■				■
10										■		

- religio; Purina nukleobaz', eltrovita en guano.
4. Havi koran inklinon al iu, kies feliĉon oni deziras; Senvokala Toskana rivero, trafluanta i.a. Florencon kaj Pizon; Konsistanta el pli-malpli pura metalo, kiu estas rigardata kiel tre multevalora.
5. Alparegiona manĝaĵo, konsistanta el fandita fromaĝo, ŝinko, terpomoj ktp.; La kvociento de la perimetro de cirklo per ĝia diametro.
6. Simbolo de boro; Havanta la idnaskan sekson.
7. Romana cifero (500); Prepozicio signifanta «en egalaj partoj, konsistantaj el»; (inverse) Brasiko kultivata por tubera radiko, furaĝo aŭ oleoriĉaj semoj.
8. (inverse) Distanco inter la bazo kaj la supro; Prepozicio signifanta, ke movo komenciĝas ĉe unu ekstremo kaj atingas la alian.
9. Speco de kalamo kun longaj, maldikaj, masivaj, flekseblaj tigoj.
10. En ŝako, movi samtempe unu turon, lokante ĝin ĉe unu flanko de la reĝo, kaj la reĝon, lokante ĝin ĉe la alia flanko de tiu turo; Ag' de tiu, kiu sciigas al iu deziron, ke li faru ion.
11. De birdoj el la ordo de paseroformaj, familio de korvedoj, kun multkolora plumaro kaj mallonga, forta beko.
12. (inverse) Simpatia inklinado al iu; Pli frue.

(la solvo troviĝas en la lasta paĝo)

proponis, ke la komunumon devas estri filozofoj. Hegel ankaŭ atribuis apartan rolon por filozofoj en la komunumo, ĉar nur ili atingas la staton kompreni sin kaj do, kompreni la veron kaj la tutan historion. Nur filozofoj komprenas, kiel dialektiko kreas laŭpaŝan vojon al homa vekigo. Do, en la fino filozofoj komprenas ĉion kaj la tutan celon de la homa historio kaj tiam la animo eniras novan etapon de sinkomprenemo.

Ekzistis multaj fanatikuloj de Hegel, sed **Arthur Schopenhauer** pensis la malon. Li diris, ke Hegel ne

alporksimiĝis sian temon serioze kaj honeste, kaj do li eĉ ne estis filozofo. Sed pri tio ni lernos en la venonta numero.

(daŭrigota)

- 
- 1 **Minervo** Romana diino de la milito kaj de la inteligenteco. **Atena** Helena diino de inteligenteco, patronino de Ateno
  - 2 **materiismo** Doktrino, laŭ kiu la materio estas la sola principo kaj la sola realaĵo en la universo (PIV)







**Saluton,**

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun filozofo Hegel

**Vasil Kadifeli**

Georg Wilhelm Friedrich Hegel (1770-1831)

“**L**a strigo de Minervo<sup>1</sup> komencas flugi nur en vesperiĝo.” Kio signifas tiu frazo? Tiuj kiuj legis la pezajn, malfacile kompreneblajn kaj tro abstraktajn verkojn de Hegel scias ke tiu fakte estas la demando mem: “Kio estas tio?” Ĝuste tiu, kiu pripensas la tagajn aferojn post vesperiĝo, la kompreno pri homaraj aferoj alvenas post ilia okazo.

Minerva aŭ Atena estas la diino pri inteligenteco.

Oni multe diskutis ĉu Hegel estis stultulo ĉu saĝulo, tamen liaj verkoj estis tre efektivaj. Li pensis, ke historio evoluas laŭ iu certa vojo kaj tio multe inspiris **Karl Marx**. Tamen estas multaj aliaj filozofoj, kiuj tute malrespektis la verkojn de Hegel ĉar li uzis terminologion tute malprecize. Ekzemple **Bertrand Russell** tute subtaksis la verkojn de Hegel, kaj **A.J. Ayer** diris ke la frazoj de Hegel tute ne havas signifon kaj liaj verkoj informas nin kiel sensignifaj poemoj kaj tute ne estas allogaj. Kontraŭe **Peter Singer** diris, ke la verkoj de Hegel estas tre profundaj kaj la ideoj li zorgas estas tre malfacilaj do pro tio liaj verkoj estas tiel nekompreneblaj.

Hegel naskiĝis en Stuttgart en la jaro 1770 kaj kreskis en la nova respubliko post la Franca Revolucio. Li nomis la revolucion “mirinda tagiĝo” kaj tiu politike malstabla kaj radikala transform-periodo tre impresis lin. En tiu periodo ŝanĝis la fundamentaj supozoj kaj ĉio, kion oni pensis esti neŝanĝebla. Hegel kredis, ke historio atingis gravegan punkton. Li komencis sian karieron kiel privata instruisto al riĉa familio kaj poste li fariĝis lernejesto. Poste li fariĝis profesoro en Berlin universitato. Kelkaj el liaj verkoj estas kolektoj de notoj li verkis por helpi siajn studentojn. Kvankam siaj verkoj estas tiel malfacile kompreneblaj, li estis la plej grava filozofo en sia epoko ĝis sia morto. Kelkaj de liaj studentoj dediĉis sin al la verkoj kaj pensoj de Hegel.

Hegel estis tre impresita de la filozofio de **Kant** (vidu Turka Stelo #022). Li kritikis la teorion de Kant pri “**noumenon/noumena**”, kiu(j) formigas realecon kaj diris, ke la menso, kiu formigas la realecon fakte estas “**reala**” kaj ne ekzistas io alia malantaŭ tio. Por Hegel ĉio estis ŝanĝebla, kaj ĉio estis ŝanĝiĝanta. Li karakterizis historion kiel longega papero envolviĝinta, kaj ĝis ĝi mem disvolviĝos ni ne povas konpreni ĝin.

Kaj tiu disvolviĝo havas sian propran formon kaj historio tute ne estas hazarda. Historio sekvas difinitan vojon, kaj kiam ni rigardos al ĝia pasinteco ni komprenas ke la sekvado de tiu vojo estis deviga. Mi certas ke multaj el vi, tute ne akceptos tiun priskribon. Por Hegel historio kaj filozofio estis interplektitaj aferoj. Sed ĉio iras al io pli bona kaj al ia fina punkto. Eble la samon diras religioj, ekzemple Kristanismo atendas la duan alvenon de Jesuo. Hegel estis kristano sed li tute ne uzis religian vidpunkton en siaj teorioj. Laŭ Hegel historio ankaŭ iras al ia finpunkto, laŭ la irvojo de la menso la animo atingos sian propran konscion.

Sed kio estas “**animo**” kaj kio signifas: “**ĝi atingos sian propran konscion**”? La germanan vorton “**Geist**” multaj homoj komprenas malsimile, kaj kelkaj tradukas ĝin kiel “**menso**”. Hegel estis idealisto, do li ŝajnas paroli pri la “menso de la tuta homaro”. Malsimile al materiistoj<sup>2</sup>, Hegel pensis ke la “animo” aŭ “menso” estas baza afero de la fizika mondo. Li priskribis la mondan historion surbaze de paŝaj evoluoj en la individua libereco, kaj ni pluiras al iu politika ŝtato kaj mondo, kiu permesos al ĉiuj kontribui per siaj individuaj liberecoj.

Li pensis, ke estas batalo inter iu ajn penso kaj ĝia kontraŭa penso, t.e. ĝia antitezo. Li priskribis sian dialektikon en la formo : **tezo + antitezo → sintezo + antitezo → nova sintezo** k.s. ĝis kiam la “animo” komplete komprenos sin t.e. ĝi atingos sian propran konscion. Do la vera forto de historio fariĝas la animo kiu konscias sin. Li rakontas pri la antikvaj ĉinaj kaj barataj civilizacioj, kie liberecon havas nur la imperiestroj, kaj la popolo tute ne estas konsciaj pri kio estas individua libereco. Poste en la persoj evoluis la koncepto de libereco ĉar ili estis venkitaj de la grekoj. Grekoj kar Romianoj pli kaj pli komprenis kio estas libereco, tamen sklaveco daŭris dum tiuj epokoj. Oni ne estis konscia, ke ne nur la riĉaj kaj fortaj sed ĉiuj homoj devas kompreni, kio estas individua libereco kaj la tuta popolo devas liberiĝi kune.

Hegel pensis, ke Kristanismo helpis homojn konscii la “animon” kaj tiel la homa animo konsciis sian propran liberecon kaj pro tio la komunumo fariĝis ordigita laŭ la reguloj de la menso. La vera libereco nur povus okazi en iu tute bone ordigita komunumo. Tamen multaj filozofoj pensas ke tiu ordiganto devigus homojn vivi en la “**racie ordigita komunumo**” eĉ se ili nevolas tion. Ĝuste tiel, kiel la fama diro de Rousseau (vidu Turka Stelo #6) “**ili estos devigitaj esti liberaj**”.

Do, oni pensus, ke Hegel estis tiu, kiu finfine konsciis la formon de la vero de la tuta homa historio. Se vi memoras, **Platono** (vidu Turka Stelo #3)

## EL LA UNUA PARTO - TAŬO



### 32

La eterna TAŬO estas sennoma kaj simpla.  
 Kvankam malgranda,  
 la mondo ne kuraĝas fari ĝin servisto.  
 Se princoj kaj reĝoj povus konservi ĝin,  
 ĉiuj aĵoj estus kiel gastoj.  
 Ĉielo kaj Tero unuiĝus,  
 por gutigi dolĉan roson.  
 La popolo sen ordonoj  
 atingus per si mem la ekvilibron.  
 Nur kiam la formado komenciĝas,  
 ekestas nomoj.  
 La nomoj atingas ankaŭ la estadon,  
 kaj oni scias ankaŭ, kie oni devas halti.  
 Se oni scias, kie oni devas halti,  
 oni ne endanĝeriĝas.  
 La rilatoj de TAŬO al la mondo  
 kompareblas kun la montoroj kaj valaj akvoj,  
 kiuj fluas en riverojn kaj marojn.

#### Rimarkoj de Anniespera

"Kuraĝas" en la originala teksto la vorto "neng" (fonetike) signifas "povas/ havas la kapablon".  
 Vd. el Wang Chongfang:  
 "Ĝi povas esti subigita al nenio sub la Ĉielo."  
 Bonvolu kompari ankaŭ la sekvajn frazojn. Vilhemo tradukis:  
 "La rilatoj de TAŬO al la mondo  
 kompareblas kun la montoroj kaj valaj akvoj,  
 kiuj fluas en riverojn kaj marojn."  
 Sed Wang Chongfang esprimas tion tiel:  
 "Ĉio sub la ĉielo revenos al la Taŭo,  
 Same kiel ĉiuj riveroj fluas al la maro."

#### Rimarkoj de Cezar

Estas interese, ke Laocio volis atingi, ke la popolo SEN ORDONOJ trovi sian ekvilibron. Tio estis en lia tempo aŭdaca penso. Klare li ekkonas, ke ekzistas rilato inter nomoj kaj ordonoj, ili necesas por povi doni ordonojn. Ke homoj ankaŭ sen nomoj vivas kaj ekzistas, estas por

moderna homo apenaŭ imagebla, sed tamen tiel estas: praloĝantoj ekzemple en la pluvbaroj de Brazilo ankoraŭ nun ne ĉiuj havas nomojn. La unuan, kion misiistoj faris, kiam ili konatiĝis al tiaj praloĝantoj, estis tio, ke ili donis nomojn al ili; indiĝenoj de Latin-Ameriko scias tre bone, ke tiu, kiu ne havas nomon, ankaŭ ne tiel simple puneblas. La neagado laŭ Laocio, kiu ankaŭ povas esti neordonado, ankaŭ en tiu ĉapitro estas la esenca temo. Wang Chongfang mencias, ke laŭ la kredo de ĉinaj antikvuloj, "dolĉa roso" falas sur la homojn nur tiukaze, se la mondo estas en plena paco.

### 33

Tiu, kiu konas aliajn, estas prudenta.  
 Tiu, kiu konas sin mem, estas saĝa.  
 Tiu, kiu venkas aliajn, fortas.  
 Tiu, kiu venkas sin mem, estas fortega.  
 Tiu, kiu klopodas kun sukceso, havas volon.  
 Tiu, kiu estas kontenta, estas riĉa.  
 Tiu, kiu ne perdas sian lokon, daŭras.  
 Tiu, kiu ne pereos ankaŭ en la morto, vivas.

#### Rimarkoj de Anniespera

En la originalo sinsekvas la du subaj frazoj male.  
 "Tiu, kiu klopodas kun sukceso, havas volon.  
 Tiu, kiu estas kontenta, estas riĉa."  
 "Klopodas kun sukceso", en la originalo estas nur: "penas" aŭ "klopodas".


#### Rimarkoj de Cezar

Vivo post la morto por Laocio ŝajne ne tute maleblas, certe en tiu senco, kiel verkisto vivas, kiu estas legata plu tiel, kiel Laocio, kvankam li delonge estas morta. Vivanta estas ne nur tiu, kiu fizike vivas, sed ankaŭ tiu, kiu post sia morto plu efikas.  
 Ret Marut esprimis tion tiel: "Sed mi diras al vi: Vivas mortuloj, en kiuj estas pli da vivo ol en vivantoj; kaj loĝas vivantoj inter vi, kiuj estas mortaj jam ekde la unua lerneja tago, kvankam ili diras al vi:  
 "Ni vivas, ĉar ni havas la potencon!" RET MARUT  
 (daŭrigota)

## Dankon Amiko (11) - de Claude Piron

- mez-nivela

### (15)



Feliĉa troviĝi sola en tiu vastega magazeno, Katarina promenis en ĝi, observante, interesiĝante pri tio kaj tio ĉi, fojfoje eĉ dancante en la pasejoj, kiuj tage ĉiam plenplenis je moviĝantoj, sed kiuj aspektis

nekredeble larĝaj ĉi-nokte pro la senhomeco.

Sed jen ŝi aŭdis, kvazaŭ pluraj homoj envenus.

"Milan! Mi forgesis pri Milan!" ŝi ekpensis. "Certe li kaptis tiun teroriston kaj ĉion rakontis al la polico. Ili do venas por vidi la eksplodaĵon. Kaj mi eĉ ne telefonis al Sekuriks! Tio aperos suspekta. Mi devas telefoni tuj."

Feliĉe, ŝi rapide trovis telefonon, kaj post kelkaj provoj sukcesis ricevi komunikiĝon kun la ekstero.

“Sekuriks,” diris dormema voĉo, post kiam la longa sonorado finfine ĉesis.

“Mi estas en Plinov,” Katarina diris, “mi telefonas nome de via gardisto. Li trafis teroriston, kiun la polico serĉas, kaj...” Ŝi rakontis la tutan aferon, kun la ŝanĝoj, kiujn ŝi trovis metindaj.

“Bone, mi tuj informos la policon. Restu tie. Vi certe tuj ricevos ties viziton,” la sekuriks-ulo finis.

Laŭ la bruoj, Katarina komprenis, ke oni serĉas ŝin. Ŝi decidis plej diskrete reiri al la loko, kie la eksplodaĵo troviĝis, kaj tie malkaŝi sin. Ŝi nun estis sur la sepa etaĝo, kaj la homoj, kiuj envenis la ĉiovendejon, aŭdeble traserĉis etaĝon post etaĝo, komencante de malsupre. Ŝi rapide ŝtuparis ĝis la kvina, kie la teroristo faris sian kaŝan laboron, kaj tie bonvenigis la policanojn, sekvatajn de Milan, kies vizaĝo montris batsignojn.

“Kion vi faras ĉi tie, nokte, en ŝlosita magazeno?” suspektete demandis unu el la policanoj.

“Mi atendas vin.”

“Kiel vi povas atendi nin? Ni eĉ ne estis informitaj pri via ĉeesto!”

Precize je tiu momento ekvivis la portebla radioaparato, elsenda kaj riceva, kiun la alia policano surhavis. La interparolo ne estis tre aŭdebla por la

aliaj ĉeestantoj, sed tuj li klarigis:

“Oni petas nin veni al la kvina etaĝo de Plinov. Tie atendas nin knabino, kiu havas ion gravan por diri.”

“Strange, ke nur nun ni iĝis informitaj,” diris la alia.

“Ho, vi scias,” Katarina respondis ridete, “tiu Sekuriks-ulo ŝajnis tiel dormema, li diris, ke li sciigos al la polico, sed mi min demandis, ĉu estas saĝe fidi lin. Tamen li tiom ripetis “estas nia tasko kontakti la policon, ne faru al vi zorgojn”, ke mi ne kuraĝis mem voki vian oficejon.”

“Ha! Sekuriks! Kompreneble!” la policanoj pli malpli samtempe diris. “Tuj kredas sin pli fortaj ol la vera polico kaj ĉiam volas solvi la problemojn mem, eĉ kiam ili ne kapablas... Sed diru do al ni, kial vi telefonis al Sekuriks kaj kion vi faras ĉi tie.”


Refoje, la raporto de Katarina ne plene prezentis la veron, sed ĝi estis kredebla, kaj ĝusta pri la detaloj, kiuj riskus enhavi gravegajn sekvojn. Kiam ŝi montris la aĵon, kiun la teroristo fiksas sub montrotablo, la policaj vizaĝoj alprenis plej seriozan esprimon. Tuj la plicestro estis informita, kaj post neimageble mallonga daŭreto alvenis fakulo pri eksplodaĵoj kaj suspektindaj objektoj.

(daŭrigota)

## Patro Kristnasko ricevis donacon

el [www.bookbox.com](http://www.bookbox.com)

**E**stis bela decembra tago kun blua ĉielo kaj neĝokovritaj arboj. Kristnasko alvenis! Sed en la dometo de Patro Kristnasko regis silento. La kutima brua ĉirkaŭkurado por prepari kristnaskdonacojn ne okazis ĉar Patro Kristnasko malsaniĝis.



“Kia katastrofo. Kion diros la infanoj kiam ili ne ricevos donacojn ĉi-jare?” Patro Kristnasko malĝoje scivolemis kuŝante sur sia lito. Subite li aŭdis bruon kiu venis el ekstere. Li rigardis tra la

fenestro kaj vidis siajn kvar boacojn kiuj staris pacience kiel kutime. Sed ŝajnis ke ili pene spiris kvazaŭ ili ĵus revenis el longa veturado. Kiam Patro Kristnasko pli atente rigardis, li ne povis kredi tion kion li vidis. Malantaŭ la boacoj estis longa vico de sledoj en kiuj sidis etaj infanoj vestitaj multkoloro.

Unu post la alia ili elsaltis sur la neĝon kaj iris en la direkton de la dometo kie loĝas Patro Kristnasko. Nelonge poste aŭdiĝis frapo ĉe la pordo. “Eniru!” kriis Patro Kristnasko kiu estis tre scivolema. Eta knabino eniris ĉirkaŭbrakante ion molan. “Mi aŭdis, ke vi estas malsana, estimata Patro Kristnasko,” ŝi ekdiris. “Tial mi donacas al vi mian pluŝurson por ke vi ne estu



sola.” “Nu, dankon eta Emilja!” diris Patro Kristnasko kiu scias la nomon de ĉiuj infanoj.

Poste eniris juna knabo tenante ruĝan pakaĵon en siaj brakoj. “Ni eksciis ke vi malsanas, Patro Kristnasko,” li diris. “Miaj familianoj do trikis tiun kovrilon por vi, por ke vi ne malvarmu dum la vintra sezono.” “Nu, kiom bonega ideo Paŭlo!” respondis la ĝojplena Patro Kristnasko karesante lin sur la kapo. Kaj unu post la alia la infanoj envenis tra la enirpordo, ĉiu havante specialan donacon por deziri al Patro Kristnasko rapidan resaniĝon. Li ricevis biskvitojn, kuketojn, ŝtrumpetojn, gantojn, librojn, puzlojn kaj eĉ etan kristnaskan arbon!

“Kristnaskaj donacoj liveritaj al mia hejmo!” diris Patro Kristnasko. “Envenu, ni dividu inter ni tiujn belegajn donacojn.” Kaj li kunigis la infanojn ĉirkaŭ sin

en granda cirklo. "Patro Kristnasko, kiun donacon vi preferas?" Emilja tuj volis scii. "Miaj karaj etuloj," respondis Patro Kristnasko ridetante. "Estas la amo kaj afableco kiujn vi ĉiuj montris al mi hodiaŭ kiuj estas la plej bona donaco." Kortuŝite li rigardis la atentemajn vizaĝojn kiuj ĉirkaŭis lin.

"Tio, miaj etuloj, estas la vera signifo de Kristnasko." Tiam Patro Kristnasko donis al ĉiu infano grandan elkoran brakumon.



De Lavina Tien

## Premio pri Homaj Rajtoj al Itala Esperanto-Federacio

Itala Esperanto-Federacio ricevis la premion "Itala premio pro homaj rajtoj 2017" fare de asocio de liberaj ĵurnalistoj kaj de la itala Sekcio de Amnesty International.

La premio konsistanta el diplomo kaj pentraĵo estis transdonita al la prezidantino de IEF, Michela Lipari, dum ceremonio en Romo.

La motivigo de la premio parolas pri la agado de IEF en la kampoj de interkompreniĝo inter popoloj laŭ la idealoj de Esperanto, de helpo al viktimoj de militoj kaj katastrofoj en la mondo, de partopreno en la agado Oriento-Okcidento de Unesko.

Jen la anonco de IEF en facebook'o:

### PREMIO ITALUJO HOMAJ RAJTOJ 2017 AL LA ITALA ESPERANTO-FEDERACIO

La asocio "Internacia Libera Gazetaro - FLIP" kaj la Itala Sekcio de Amnesty International, kiuj ĉiujare aljuĝas la premion italan pro homaj rajtoj kun subtitolo "tumonda civilizo kaj homaj rajtoj", dediĉita al la memoro de la eksa vicprezidanto de FLIP, Antonio Russo, donis la premion (diplomon kaj pentraĵon) al la Itala Esperanto-Federacio pere de Michela Lipari pro ĉi tiuj motivoj:

La Itala Esperanto-Federacio estis fondita en 1910. Ĝi estas oficiale agnoskita senprofitcela asocio de 1956.

Ĝi partoprenas regule al la kampanjoj organizitaj de la monda asocio de esperantistoj por helpi esperantistojn, kiuj estas viktimoj de naturaj katastrofoj kaj de militoj en la malsamaj regionoj de la mondo.

Ĝi kontribuas al la kampanjo de Unesko "Serio

Oriento-Okcidento" por diskonigi la literaturajn ĉefverkojn de la pluraj kulturoj eksterlanden, el la itala estis tradukitaj al Esperanto verkoj kiaj la Dia Komedio de Dante, la Princo de Machiavelli, la Malemuloj de Verga, la Gefianĉoj de Manzoni, Homa vivo de Ungaretti, la Kantoj de Leopardi, Myricae de Pascoli, kaj ankoraŭ aliaj.

Oni proponas al la itala publiko ankaŭ kelkajn ĉefverkojn de la Esperanto-mondo, kiaj Robinson en Siberio kaj Maskobalo en Budapeŝto de Tivadar Soros, la Infana raso de William Auld, la Zamenhof-strato de Roman Dobrzynski kaj ankoraŭ aliaj.

Inter la statutaj celoj de IEF oni legas: "...inspire de la idealoj de Esperanto, aranĝas solidarecajn iniciatojn, kiuj celas promocii pli profundan kulturen integriĝon inter homoj kaj popoloj kun malsamaj lingvoj".

Temas pri principoj kaj celoj komunaj al la premio "homaj rajtoj 2017" de la asocio FLIP kaj de la itala sekcio de Amnesty International, kiuj volas agnoski ĝian valoron kaj aparte mencias la prezidantaron de IEF, Michela Lipari.



## Ekspozicio pri Zamenhof

"La iniciatinto de Esperanto" ĉe la itala Parlamento

Lunde, la 6-an de novembro oni inaŭguris ekspozicion pri Ludvik Zamenhof organizita de la ambasadejo de Pollando en Romo kaj de Itala Esperanto-Federacio. "La iniciatinto de Esperanto,

1959-1917" estos vizitebla ĝis la 20a de novembro ĉe la Biblioteko de la Deputita Ĉambro kaj konsistas el vertikalaj paneloj kaj alternaj horizontalaj vitrinoj pri la jenaj temoj: mondaj kaj italaj literaturaĵoj tradukitaj en Esperanton, infanaj libroj, esperantologio, turismaj gvidlibroj, religioj, fotoj atestantaj la sekvojn de nuklea

>>>



La 5an de oktobro la Sveda Akademio anoncis, ke ĝi aljuĝis la Nobel-Premion pri Literaturo 2017 al japandevena brita verkisto Kazuo ISHIGURO. Ankaŭ ĉi-jare japana populara verkisto MURAKAMI Haruki ne povis kontentigi siajn adorantojn, kiuj senpacience atendis lian premiigon.

ISHIGURO naskiĝis en Nagasako, Japanio en 1954. Ambaŭ liaj gepatroj estas japanoj. Li translokiĝis al Britio kun siaj gepatroj en la aĝo de kvin jaroj, kiam lia patro komencis labori en brita instituto. En 1982 li akiris britan naciecon kaj perdis la japanan.

Li verkas ĉiujn siajn romanojn en la angla. Unuafoje en 1982 li altiris grandan atenton de legantoj per sia unua romano "A Pale View of Hills (Pala aspekto de monteto)", kies heroino estas japana virino vivanta en Britio. Poste en 1989, la romano "The Remains of the Day (Restaĵo de la tago)" kiu skribas pri problemoj de la Dua Mondmilito gajnis la Booker-premion, unu el la plej prestiĝaj premioj pri literaturo en la mondo. Per tiu ĉi romano li akiris renomon kiel internacia verkisto.

Krome, la romano "Never Let Me Go (Ne lasu min)" kiu temas pri medicina kaj vivscienca problemoj estis dramigita de japana fama reĝisoro NINAGAWA Yukio en 2014, kaj plie en 2014 estis elsendita kiel televida dramserio kun AYASE Haruka kiel ĉefaktorino.

Tuj kiam li informiĝis pri sia premiigo je la Nobel-Premio, li ricevis demandon pri sia rilato kun Japanio. Li respondis: "Ĉiam restas en mia koro memoroj pri Japanio, kvankam mi kreskis kaj edukiĝis en Britio. Probable plejparto de mia vivmaniero, mondkoncepto kaj arta sento estas la sama kiel tiu de japanoj. Ŝajnas, ke tio bone efikas al mi kiel verkisto."

En intervjuo post la anonco de la premio ISHIGURO citis la usonan muzikiston Bob Dylan, la lastjaran ricevinton de la literatura Nobel-premio, kiel sian plej grandan heroon ekde la aĝo de dek tri jaroj. Por li estis granda honoro ricevi la saman premion post li ĉi-jare.

De antaŭe ISHIGURO persone konas japanajn verkistojn kiel MURAKAMI Haruki kaj IKEZAWA Natsuki. Precipe ISHIGURO kaj MURAKAMI publike diras, ke ili ŝatas legi reciproke siajn verkojn. ISHIGURO menciis sian longdaŭran amikon MURAKAMI, kiel la plej eblan kandidaton por la premio.

Ĉiujare post 2006, MURAKAMI estas rigardata kiel unu el la promesplenaj kandidatoj de la Premio kaj ĉiamokupas altan rangon en la prognozo pri premiitoj de la Nobel-Premio farata de la monde plej grandavetfirmo Ladbrokes en Britio. Pri tiu senbaza onidiro li skribas en sia eseo: "Mi tre bedaŭras, ke mi estas traktata kiel vetĉevalo." Cetere, ĉi-jare ne estis la nomo de ISHIGURO en la listo de promesplenaj kandidatoj.



>>> bombado super Hiroshimo kaj Nagasaki, la paco-premio "Zamenhof" por pli justa mondo, kun fotoj de kelkaj gajnantoj plej konataj en Italio (Moni Ovadia, Tiziano Terzani, Claudio Abbado ktp).

Je la inaŭguro partoprenis kvindeko da invititoj, ĝenerale konsilantoj de ministerioj, diplomatoj oficistoj

de la biblioteko kaj kelkaj esperantistoj. Inaugurajn paroladojn faris la afersharghito de la pollanda ambasadejo s-ino Marta Zielinska-Sliwka, la prezidanto de la Komisiono pri eksterlandaj aferoj de la Deputita Ĉambro hon. Fabrizio Cicchitto, la itala ambasadoro en Norvegio kaj Islando Giorgio Novello

kaj la prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, Michela Lipari, kiu poste gvidis la gastojn al vizito de la ekspozicio.

La itala publika nacia televido filmis la inaŭguron kaj la tutan ekspozicion, kiu estos vizitebla ĝis la 20-a de novembro.



## Esperanto Kurso (23)



### Tekrar merhaba,

Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı kitaptan kursumuza devam ediyoruz .

Derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın

çünkü bu dilbilgisi açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Metin içindeki tirelerin ("") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanılıyor.

## LA HORO

"Kioma horo estas?" demandis Sinjoro Muso, unu post-tag-mezon.

"Estas la dua," respondis Roĝero, elvenante el la manĝo-ĉambro.

"Estas la tria dudek," respondis Ŝila, elvenante el la dormo-ĉambro.

"Estas dek minutoj antaŭ la kvara," diris la patrino muso, rigardante sian poŝ-horloĝon.

"Nu, nu! Tio estas stranga afero!" diris la patrino muso, Ĉu, ĉiuj horloĝoj estas malĝustaj hodiaŭ?"

Jes, estis stranga afero! La horloĝo en la manĝo-ĉambro diris, ke estas la dua precize. La horloĝo en la dormo-ĉambro diris, ke estas la tria dudek. La poŝ-horloĝo de Sinjorino Muso diris, ke estas dek minutoj antaŭ la kvara.

"Tio estas stranga afero," diris Roĝero.

"Ho, ho," diris Ŝila, "Rigardu Johanon!"

Johano estis kaŝ-anta sin mal-antaŭ la kurtenoj. Li ridis laŭte.

"Johano! Kion vi faris?" demandis la patrino muso.

"Ho," diris Johano. "Mi ludis, ke mi estas la viro, kiu streĉas la horloĝojn, kaj mi streĉis ilin, kaj tiam mi movis la montr-il-ojn."

"Ho, Johano! Estas malbone movi la montrilojn de la horloĝoj. Vi estas malbona museto."

"Mi bedaŭras," diris Johano kun rideto.

La patrino muso ĝustigis la montrilojn de la horloĝoj.


La ĝusta horo estis dek minutoj antaŭ la kvara.

### Saat ifadeleri

estas la tria	saat üç	tria kaj dek minutoj	üçü on geçe
je la tria	saat üçte	dek minutoj antaŭ la tria	üçe on kala
ĝis la tria horo	saat üçe kadar	la tria kaj duono	üç buçuk
antaŭ la tria	üçten önce	la tria kaj kvarono	üç çekrek
post la tria	üçte sonra	la tria kaj kvardek kvin minutoj	üç kırkbeş
		kvarono antaŭ la tria	üçe çeyrek kala
		kvin dek minutoj antaŭ la tria	üçe on beş kala



TAGO DE HOMAJ RAJTOJ  
10a de decembro



<b>Sözlük</b>		kioma	kaçıncı (saatlerde	göstergeç, saat kolu
bedaŭri	üzülmek, üzüntü duymak		saati sormak için kullanılır)	cep-saati
dek minutoj antaŭ la kvara	Dörde on var, dörde on kala (saat)	kurteno	perde	öğleden sonra
elvenante	dışarıya çıkarak (zarf)	la dua	ikinci, saatte "saat iki"yi ifade eder	tam olarak, kesin olarak
ĝusta	doğru	la tria dudek	(saat) üç yirmi, üçü yirmi geçiyor	gülmek
ĝustigi	(bir şeyi) düzeltmek	mal-antaŭ	arkasında	bakarak (zarf)
kaŝ-anta	saklanmakta olan (şu anda)	malĝusta	hatalı	garip
kaŝi	saklamak (bir şeyi)	montri	göstermek	germek (burada saati kurmak, zembereği germek)
		montrilo	gösterme aracı,	

## Tago de l' Negra Konscienco

Imite al Nietzsche, malhumanas,  
tro malhumanas, sklaviganta homo  
ekde l' prahistoriaj tempoj  
de la krudfrenza homaro.



Nin hontigas sklavig', kaj ĝi  
Brazilon fratan humiligas.  
Ĉu kompensas pardonpeti?



Maria Nazaré Laroca  
Juiz de Fora, 19/11/2017



**H**umuso estas mola, sana, delica kaj tre facile preparebla kikerkaĉo aŭ pureo. Ĝin oni faris jam en antikva Egiptujo kaj bongustegas akompanita de olivoj, naĉoj, krudaj legomoj, kun pita-pano aŭ kiel ŝmiraĵo. La kikerpureo estas bona maniero manĝi legumojn kiam varmas. Humuson mi ŝatas ĉar ĝi estas satiga kaj plenas je diversaj proprecoj tipaj de legumeno kiaj kikerroj: vitaminoj A, B6, C, E kaj K, kalcio, fosforo, kalio, zinko, magnezio, fero kaj natrio.



La kutima recepto enhavas sezampaston kiun oni kutime nomas "tahini" sed mi mem ne havis tiumomente sed ja sezam-semojn. Vi povas facile uzi unu el ili aŭ eĉ entute ne uzi sezamon. La rezulton vi same ŝatos!

Vi povas enakvigi kikerajn tutan antaŭan nokton kaj poste kuiri ilin sed mi preferis aĉeti endosigitajn kuiritajn kikerajn por ne malŝpari tempon.

**Ingrediencoj:**

- 160 gramoj da krudaj kikerroj aŭ 400 gramoj da kuiritaj kikerroj
- citronosuko de unu citrono
- 1 kulero da sezampasto "tahini"
- 1 ajlero
- 1/2 kulere to da salo
- 1/2 kulere to da kumino
- 1/2 taso da akvo
- iomete da olivoleo
- 1 kulero da papriko

**Paŝoj:**

- Se vi uzos krudajn kikerajn, enakvigu ilin inter 8 kaj 12 horoj en abunda akvo, verŝu ilin en la kaserolon kiam la akvo bolu kaj kuiru ilin dum 2 horoj kaj aldonu salon laŭplaĉe.
- Verŝu la kikerajn en mikspartaton kun la citronosuko, la sezampasto, ajlero, salo, kumino kaj akvo kaj kirlu ĝis akiri de sameca pureo. Se vi ŝatas ĝin pli likvece, aldonu iom pli da akvo.
- Por servi ĝin uzu teleron aŭ bovlon kaj per kulero kreu faltojn, aldonu olivoleon kaj paprikon. Laste, elektu kun kio vi manĝos ĝin! Mi manĝis kun rostita pano!

**Bonan apetiton!**

Fonto: <http://veganarto.net/humuso-kikerpureo/>



*Solvo de la krucvort-enigmo*

10	B	O	N	A	P	A	R	T	O	L	E	
9	A	I	R	I	N	A	V	G	T	U		
8	F	O	N	O	I	P	A	N	E	M	A	
7		T	A	T	O	O	R	A	P	T		
6	I	N	U	N	D	O	T	T	O	N		
5	Z	A	G	R	E	B	O	L	A			
4	I	N			L		P	A	R	K	O	
3	L	O	G	I	K	O	L	O	R	A		
2	O	B	A	M	A	O	T	E	R	A	M	
1	K	A	M	A	R	A	D	O	A	G	O	
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12